

## **Antologio VII**

### **Hector Hodler**

Direktoro kaj vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio

### **Esperanta lingvo kaj organizado de la Esperanto-movado (1907-1913)**

El: *Esperanto* (UEA)

#### *Enkonduko:*

Hector Hodler (1887-1920) restas al la e-istoj memorinda kiel signifa svisa Eo-pioniro, kiel kunfondinto de UEA en Ĝenevo, sed ankaŭ kiel filo de la elstara berna pentristo Ferdinand Hodler. Kun Edmond Privat (1889-1962), lia lerneja kolego, Hodler eklernis la zamenhofan lingvon, kaj samtempe komencis konkrete agi cele al la e-ista praktikado.

En 1907 Hodler transprenis la redaktadon de la revuo *Esperanto* el la manoj de ĝia fondinto Paul Berthelot (1882-1910), fariĝante mem ĝia posedanto kaj redaktoro ĝis 1920, la jaro de la morto de Hodler. La 12an de februaro 1907 Hodler aperigis sian unuan numeron.

Sub redaktoro Hodler *Esperanto* aperadis pli ol 13 jaroj regule (escepte de ses monatoj en 1914). En la antaŭ- kaj postfonda tempo de UEA Hodler publikigis en ĝi multajn signifajn artikolojn pri la neceso de internacia organizaĵo e-ista. Dum la milito li verkis pri la problemoj de paco kaj pri internacia pacorganizo, kiu estas bezonata (→Antologio XIII). Luj liaj artikoloj estis signitaj per 'A.R.'

*Enciklopedio de Esperanto* (1933) skribis pri la revuo de Hodler jenon: „La enhavo estis lerta miksaĵo de tagaj kaj e-istaj okazintaĵoj. Jam en la unuaj numeroj montriĝas la talento de Hodler, turni la atenton al praktikaj aferoj. Li tendence atentis sociajn problemojn kaj ĉiam revenis je la ĉefa ideo: harmonia kunlaboro de ĉiuj popoloj pere de Esperanto.” Dum la milito, „en artikoloj ankoraŭ nun legindaj la redaktoro montris la kaŭzojn de la tutmonda katastrofo, laŭgrade evoluigante la ĉefajn ideojn pri la intergenta malordo.”

La proponoj de Alphonse Carles (+1930) kaj Théophile Rousseau (1876-1916) pri la Eo-konsuloj kaj Eo-oficejoj kun la celo provizi e-istojn kaj ne-esperantistojn per diversspecaj servoj koincidis kun la hodleraj planoj realigi la ardan deziron de L.L. Zamenhof pri tutmonda ligo e-ista. Tiel la strebadoj de Hector Hodler kondukis al la fonda de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Ĝenevo, urbo de internaciaj organizaĵoj, en printempo 1908.

En la revuo *Esperanto* Hector Hodler prezentis kaj diskutis la sistemon de konsuloj kaj Eo-oficejoj, la problemon de la lingvaj reformoj en Eo kaj skribis entute pri la bezonoj de internacia organizaĵo e-ista.

La komencon de la ĉi-sekve elektita artikolserio formas la kontribuaĵo, kiu aperis sub la titolo 'Grava Momento' en *Esperanto*, n-ro 20 de la 27a de novembro 1907. En tiu artikolo Hodler traktas la demandon de la reformoj en la lingvo Eo, kiel ili estis proponitaj de la Delegitaro por la Alpreno de Internacia Lingvo. Principe Hodler ne esprimis sin kontraŭ plibonigoj en la lingvo Eo, kondiĉe ke ili pruvigis taŭgaj. Tamen Hodler estis konvinkita, ke la 'Fundamento' de Eo estu la sole vera garantio de nia unueco kaj de nia estonta progreso, kiun necesus nepre konservi.

En dua ĉi-koncerna artikolo sub la titolo 'La nuna necesaĵo' aperinta en *Esperanto* de la 12a de decembro 1907, Hector Hodler konstatis la mankon de centra organizaĵo de la e-istoj, kiu ekfunkciu kiel ĉefa kaj kompetenta reprezentejo de la Eo-movado, apud la Centra Oficejo kiel pure administra organizaĵo, kiu ĉefe zorgu pri la organizado de la kongresoj,

kaj la Lingva Komitato, kiu okupiĝu pri lingvaj demandoj. Por ke Eo rapide progresu, Hodler sentis la neceson de tia centra organizaĵo, „se ni ne volas, ke konfuzeco kaj anarkio estu la regantaj principoj de nia afero.”

La celojn kaj taskojn de la nova organizo, kiu estis oficiale fondita la 1an de majo 1908 en Ĝenevo sub la nomo Universala Esperanto-Asocio (UEA), vicprezidanto Hector Hodler resumis en fundamenta parolado, kiun li prezentis okaze de la malfermo de la 4a Universala Kongreso en Dresdeno (Germanio) la 18an de aŭgusto 1908. Lia prelego estis publikigita en la revuo *Esperanto* de la 1-15 de septembro 1908. En sia atentinda elpaŝo Hodler reliefigis la esencon de la Eo-propagando; multaj de tiuj principoj validas fakte ĝis hodiaŭ.

Post tiuj artikoloj sekvas ĉerpaĵoj el aliaj artikoloj de la jaroj 1909-1913, kiuj donas realan imagon pri la pensado de Hector Hodler rilate diversajn aspektojn de la organizado de la Eo-movado.

Per UEA Hodler volis praktike servi kaj efike utili al la homoj. Li ne kredis, ke la agado de UEA havas kiel konsekvencon la fratecon inter la homoj, sed opiniis, ke la tasko de UEA estu nur disponigi difinitajn praktikajn servojn al la membroj, doni al ili la okazon interŝanĝi ideojn kaj servojn, do esence klopodi plibonigi la internaciajn rilatojn, subteni kaj instigi ĉiun plifaciligon de la internacia vivo. Egoistajn tendencojn kaj laŭtajn politikistojn, kiuj nur celas bruon propagandon kaj atentigi pri si mem, Hodler malŝatis kaj juĝis maltaŭgaj por la Eo-movado. Tial Hodler alvokis la Asocion, por ke ĝi pruvu sian utilecon per praktikaj laboroj, ĉar finfine oni ne kreis organizaĵon por ĝi mem.

Laŭ Hodler la Eo-movado estas unuavice *socia* movado. Tion li eksentis de la momento kiam li pli profunde konatiĝis kun la movado de la esperantismo, kiel li mem klarigis. Kiel sinonimon de la organizaĵo UEA li utiligis la vorton *Esperantio*. Kaj diference de la e-istoj, kiuj simple uzas Eon por kiaj ajn celoj, laŭ Hodler la *Esperantianoj* estas Eo-lingvo-praktikantoj, sed pli ligitaj per forta emocia sento de solidareco al la komunumo. La nocio Esperantio cetere mankas en PIV.

Rilate la venkon de la esperantismo Hodler atentigis, ke ĝi ne venos de la mondo ekstera, oficiala aŭ scienca, se ĝi ne unue plene komprenis la esencon de la esperantismo; la venko estus la propra kaj la sola verko de tiuj homoj, kiuj konsciaj pri sia celo sin organizis kaj laboris senĉese kaj sen flankaj diskutoj, por ne malhelpi la efektivecon de ĉi tiu celo, sed sekvante la vojon elektitan: „Nur per nia propra laboro, ni rompos la graniton de l'mondo.”

La artikoloj de Hector Hodler estas karakterizitaj de klareco kaj eleganteco en la stilo, de brila retoriko kaj de sincereco kaj malhipokriteco en la eldiroj. Tabuoj por Hodler ne ekzistis, kaj li ne hezitis ilin publike esprimi kaj diskutigi.

*Originala teksto (en Esperanto):*

Kiel ni jam mallonge informis nian legantaron, la Komitato balotita de la Delegitaro por la enkonduko de lingvo internacia, ekzameninte la diversajn proponitajn sistemojn de lingvo universala, elektis Esperanton «pro ĝia relativa perfekteco kaj ĝiaj jam multaj praktikaj aplikaĵoj», sed kun propono de reformoj kaj korektoj, kiuj estos ekzamenataj de la kompetenta Esperantista aŭtoritato, tio estas de nia Lingva Komitato. Tiu lasta parto de la dirita decido jam elvokis diversajn komentariojn en nia gazetar Esperanta. Ni komence opiniis, ke antaŭ ol diskuti pri tiu demando, estas pli bone atendi la rezultaton de la laboroj de la Lingva Komitato, sed ĉar tra la Esperantistaro diskuras nun diversaj ofte neĝustaj famoj, ĉar de tre multaj flankoj oni demandas nin pri la nunaj okazantaĵoj kaj ilia signifo por Esperanto, ni kredas, ke la momento jam venis por klarigi nian opinion al la publiko Esperantista, kiu antaŭ ĉio kaj ĉiu estas ĉefe interesata en tia demando.

Oni ofte diris, ke artefarita lingvo internacia estas la rezultato de libere akceptita interkonsento aŭ ‘kontrakto’ inter ĝia elpensinto kaj ĝiaj adeptoj; tiu kontrakto anstataŭas la unue mankantan tradicion kaj estas la nepre necesa fundamento, super kiu devas labori ĉiuj uzantoj de tiu lingvo por ebligi la iom-post-ioman kreiĝadon de vivanta tradicio, kiu garantios la lingvon kontraŭ ĉiuj arbitraj reformoj kaj personaj kapricoj. La necesecon de tia komuna por ĉiuj netuŝebla fundamento konstante akceptis la Esperantistoj, kaj en la daŭro de dudek jaroj, ili energie kontraŭbatalis ĉiujn privatajn provojn pri plibonigado aŭ reformoj. Dank’ al tiu severe konservita disciplino, Esperanto povis atingi sian nunan prosperecon kaj la tempo ne estis perdita per senfinaj teoriaj diskutoj; dank’ al ĝi ni povis ne nur iniciati atentindan kaj potencon movadon, sed ankaŭ krei gravan literaturon, rimarkindan pro sia unueco. Tiu maksimuma netuŝebla fundamento de Esperanto, kiu en la komenco estis la rezultato de la silenta interkonsento de la Esperantistoj, estis oficiale sankciigita de la Bulonja kongreso, kaj de tiu epoko, al ĉiuj provoj enkonduki reformojn, oni respondis per tio, ke la Fundamento estas por ni absolute necesa, ĉar de la momento kiam tiu Fundamento perdis sian gravecon kaj konstantecon, Esperanto fariĝus tro ŝancelebla, ne certa, ĉiam elmetata al la risko de perfortaj reformoj, kiuj rompus ĝian literaturon, kaj malpermesus ĉian propagandon kaj ĉian praktikan laboron, fareblajn, nur se la formo de la lingvo estas certa. ‘Fundamento’ estas do la sole vera garantio de nia unueco kaj de nia estonta progreso, ĝis la momento kiam la kreita vivanta tradicio estos la plej bona fundamento kaj nin ŝirmos kontraŭ ĉiuj danĝeroj pro reformoj, kaj ĝis la momento kiam Esperanto, posedante potencon kaj diversfakan literaturon, estos *uzata* de centmiloj da homoj kaj jam enradikigita en niaj bezonoj. Tiam ia skribita kaj difinita fundamento estus neutila, ĉar nia lingvo estos vere *vivanta*: sed tiu momento ne ankoraŭ venis, kaj nun, kiam Esperanto, malgraŭ siaj gravaj sukcesoj, estas en la periodo de l’komenco, tia preciza interkonsento estas tute necesa.

Sed posedi klare formulitan fundamenton ne sufiĉas; estas ankaŭ necese scii en kio ĝi konsistas, kion ĝi permesas kaj kion ĝi ne permesas. (...)

Konsekvence, ĉiujn reformojn arbitrajn kaj a-prioriajn, kiujn oni proponas kaj pri kiuj la sperto ne montris, ke ili estas utilaj kaj praktikaj, la Esperantistoj devas nepre malakcepti, ĉar ili rekte kontraŭstaras al la esenco de la fundamento kaj enkondukus tre danĝeran ekzemplon por la estonteco, sed ĉiujn proponojn utilajn por la pliboniĝo de nia lingvo la Esperantistoj devas atente ekzameni kaj prijuĝi sen blinda

konservativemeco, ĉar konsideri la Fundamenton kiel limigilon de ĉia novaĵo, kiel dogmon ekster kiu nenio estas akceptebla estas tiel same kontraŭa al la spirito de tiu fundamento kaj de la elpensinto mem de Esperanto, kiel la opinio de tiuj, kiuj kredas, ke nenia progreso estas farebla dum ni havos fundamenton. Ne, la Fundamento, larĝe interpretita, ebligas ĉian pliboniĝon, ĉian saĝan antaŭenpaŝon, ĉar ĝi havas en si ĉiujn vivigajn principojn per kiuj nia lingvo povos pli rapide kaj pli logike progresadi ol la naturaj idiomoj. Sed, oni demandos nin, ĉu inter la nun proponataj reformoj, kiuj ne enkondukus gravan rompon en la tradicio, oni povas trovi kelkajn, kiuj estas utilaj kaj respondas veran bezonon? Ĉu la nuna lingvo, absolute sen aldono kaj sen novaĵo, ne tute sufiĉas, ĉar dank' al ĝi, ni povis realigi ĝis nun tiel gravajn progresojn? Ĉu oni devas peni atingi perfektecon, kiu en la praktiko cetere estas ne realigebla? Al tiuj demandoj ni respondos sen ŝanceliĝo: jes, inter la nun proponataj reformoj, oni povas elekti tiujn, kiuj ne rekte kontraŭstaras al la Fundamento kaj estas realigeblaj laŭ la maniero, kiun ĝi difinas; jes, el la sperto akirita per la ĝisnuna uzado, oni povas elekti la korektojn kaj aldonojn farindajn en Esperanto; jes, estas dezirinde, ke la lingvo internacia, kiu estos ĉefe scienca kaj teknika lingvo, estu kiel eble plej preciza kaj perfekta. Dum dudek jaroj, ni laboris super la fundamento, ni pliriĉigis la lingvon la lingvon kreante literaturon, ni interŝanĝis korespondaĵojn, ni faris sukcesajn provojn pri la parolebleco de Esperanto per niaj kongresoj, sed ĝis nun Esperanto estas ankoraŭ tre malmulte praktike *uzata*; en la scienco kaj en la diversaj fakoj, kie ĝia signifo estas grandega, ĝi nur komencas penetri, kaj la jam akirita sperto montris al ni, ke se la lingvo sufiĉas por la ordinaraj bezonoj kaj la ĉiutaga uzado, ĝi postulas pli grandan precizecon por la scienca kaj teknika praktikado; lingvon internacian ni bezonas ne nur por esprimi ĝeneralajn ideojn aŭ por traduki literaturaĵojn, sed ĉefe por ke la diversnaciaj samprofesianoj kaj samfakanoj povu oportune interrilati. Ni havas la okazon enkonduki en nian lingvon kelkajn verajn plibonigojn kaj aldonojn, dank' al kiuj la lingvo scienca fariĝus ankoraŭ pli logika kaj pli preciza. Kial ni tion ĉi ne farus, simple ĉar oni devus aldoni malmultajn novajn sufiksojn kaj formuli kelkajn firmajn regulojn? Ĝis nun ekzistis en nia lingvo vasta libereco, sed, se ni ne antaŭzorgas, tiu libereco fariĝos konfuzeco kaj anarĥio, kiuj rekte kontraŭstaras al la principoj, laŭ kiuj estis konstruita Esperanto. Ju pli disvastiĝas nia lingvo, despli fariĝas diversa kaj delikata ĝia uzado. En la lasta tempo, pro manko de kelkaj precizaj reguloj, bedaŭrindaj nelogikaĵoj kaj esceptoj estis enkondukitaj en la lingvon, ne ĉar ili estis nature postulitaj, sed ĉar oni faras vortarojn sen certa plano por ne kontraŭstari al la Fundamento, kiu ne donas regulon pri tia aŭ alia punkto, aŭ lasas liberecon, kiu per la praktiko montriĝas nun jam ne bona. Oni simple forgesas, ne tiu Fundamento estas la maksimumo netuŝebla, sed ke ekster ĝi oni povas, kaj eĉ devas, laŭeble plibonigi la lingvon. Oni ripetas al ni, ke Esperanto estas lingvo vivanta kaj ke ĝi devas evolui tute same kiel la lingvoj vivantaj (en la realeco, tio signifas, ke ni povas enkonduki nenian novaĵon kaj ke ni devas senpense obei la skribitajn tekstojn), sed kompare kun la vivo kaj disvastiĝeco de la vivantaj idiomoj, Esperanto estas ankoraŭ tre malforta kaj ni ne rajtas sklavigi la estontajn generaciojn kaj trudi al ili malbonaĵojn nun facile korekteblajn, nur tial ke tio nin devigus senigi nin je kelkaj malbonaj kutimoj.

Fine, oni demandos nin: ĉu la momento estas oportuna por enkonduki kelkajn korektojn en la lingvon? Ĉu ne estas pli bone atendi, ĝis la registaroj akceptos nian lingvon? Ĉu oni ne devos dediĉi ĉiujn niajn fortojn nur al la propagando? Al tio ĉi ni respondos: La momento estas nun oportuna; la Delegitaro reprezentas atentindan aŭtoritatecon kaj, ne nur por ĝi, sed por la bono de Esperanto, ni povas sen danĝero elekti inter la proponitaj aldonoj kaj korektoj tion, kio estas realigebla laŭ la plano montrita en la fundamento sen rompo en la tradicio. La sankcio de la registaroj venos nur multe pli malfrue, kiam nia afero estos praktike elprovita kaj kiam ĝi estos verŝajne tiel grava, ke ĉia reformo estos farebla nur kun la plej granda malfacileco. Fine, la propagando estas nur unu flanko de nia movado; la alia, sen kiu la propagando estus nur sencela klopodo, estas la uzado de Esperanto kaj ĝia enkonduko en la sciencon kaj en ĝiajn sennombrajn

fakojn. Por io estas necese ke ni havu lingvon kiel eble plej bonan kaj precizan; se ne, ĉiuj geniaj principoj, laŭ kiuj estas starigita Esperanto, estos kvazaŭ perditaj en la amaso de nelogikaĵoj, idiotismoj kaj konfuzajoj, kiujn ni ricevos en la lingvo teknika kaj fine en la lingvo ordinara se ni sen ekzameno rifuzas ĉian eĉ plej necesan novaĵojn. Fine ni diras, ke pri ĉia aldono en la lingvo devas juĝi la Esperantistaro mem; neniu homo kaj neniu komitato havas la rajton trudi al ĝi perforte sian personan bonplaĉon.

Ni konkludas, ke la ekzisto de fundamento komuna kaj netuŝebla estas necesa por la unueco de nia afero, sed tiu fundamento permesas ĉian reformon kaj aldondon, kondiĉe ke tio estu farata nature, sen rompo. La momento estas oportuna por enkonduki en nian lingvon kelkajn aldonojn kaj korektojn konformajn al ĝiaj esencaj principoj kaj por forigi kelkajn malbonaĵojn, kiuj per si mem estas kontraŭaj al la principoj de tiu Fundamento. Tio ĉi prezentas nenan danĝeron se ni senparte kaj mature ekzamenas ĉion, kio estas *realigebla* tiamaniere. Forĵeti senpense ĉion proponatan kiel ion malbonan kaj malutilan, aŭ akcepti ĉion proponatan kiel ion bonan kaj superan pro tiu sola kaŭzo ke ĝi estas nova, kondukos nin al egale pereiga ĥaoso. La meza vojo estas bona; ni esperas, ke ambaŭflanke la Delegitaro kaj la Esperantistaro ĝin sekvos. (*Esperanto*, 27 novembro 1907).

\*\*\*\*\*

Ni unue rememorigu la hodiaŭan situacion: la Delegitaro por la alpreno de lingvo internacia principe akceptis Esperanton sed kun propono de reformoj, kiuj, se ili estus akceptataj en sia estanta formo, *multe* ŝangus nian lingvon. Komprenoble, inter tiuj reformoj kaj aldonoj, kelkaj estus enkondukeblaj sen danĝero kaj estas, se ne tuj akceptindaj, almenaŭ diskutindaj, sed antaŭ ĉio estas necesa unu kondiĉo, pri kiu oni nun tute silentas, nome: kiu en la Esperantistaro havas la rajton proponi (ne trudi difinitajn plibonigojn kaj aldonojn en nian lingvon, au per aliaj vortoj, kiu aŭtoritato reprezentas la tutan Esperantistaron kaj rajtas paroli en ĝia nomo? Tiu ĉi demando havas apartan gravecon en la momento kiam la komitato de la Delegitaro prezentas al la Esperantistaro ion, kiun ni devas atente ekzameni kaj respondi. La diritan demandon kelkaj Esperantistoj sendube respondos per tio, ke D-ro Zamenhof havas nepridisputeblan aŭtoritatecon super la tuta Esperantistaro; sed oni scias, ke de la komenco de nia afero, D-ro Zamenhof fordonis ĉian rajton de aŭtoreco pri Esperanto, kiu jam fariĝis la posedajo de la tuta publiko esperantista, La aŭtoritateco de D-ro Zamenhof, laŭ liaj multfojaj paroloj, estos do pure morala. Aliaj asertos, ke la aŭtoritatecon pri la lingvaj demandoj posedas ekskluzive la Lingva komitato, sed ni rememoru, ke la Lingva komitato estis nur provizore elektita de la Bulonja kongreso laŭ neordinara maniero; ĝi povas nur doni konsilojn en limigitaj okazoj, sed tute ne povas decidi mem pri gravaj demandoj en kiuj estas egale interesataj ĉiuj Esperantistoj, ĉar ĝia aŭtoritateco neniam estis oficiale sankciigita de la Esperantistaro (la Bulonja kongreso, laŭ ĉiuj tiam esprimataj opinioj, havis nenan leĝodonan povon. La Centra Officejo estas aliparte pure administracia organizaĵo kiu ĉefe zorgas pri la kongresoj. Fine, niaj kongresoj, tion oni ofte diras, reprezentas ne la Esperantistaron, sed simple tiujn personojn, kiuj povas veturi al la kongresurbo; ili estas nur festo, grava publika manifestado, kiu simile al ĉiu esperantista kunveno, povas esprimi nur dezirojn kaj konsilojn. La Esperantistaro estas reprezentata nur de la lokaj grupoj, naciaj societoj, fakaj asocioj, sed, oni scias, tiuj organizaĵoj havas nenan efektivan ligilon inter si kaj vivas tute aparte unu de la alia. Ni do estas en tiu bedaŭrinda situacio: la Esperantistoj ekzistas, sed ili havas absolute nenan rajtan aŭtoritaton kaj

nenian laŭleĝan interligilon. Por garantii nian unuecon en ĉiuj demandoj interesantaj nian aferon, ni havas nur moralan, pure idean ligilon, facile rompeblan.

Ĝis nun, pro tio ke nia movado estis ankoraŭ malgranda, ni ne plene konstatis la malbonecon kaj danĝeron de tiu sistemo, sed ĵus venis la unua grava fakto, kiu montras, ke ni ne povas resti en tia situacio. Al la Delegitaro, kiu proponas ion difinitan al la Esperantistaro, povas plenrajte kaj oficiale respondu *neniu*, ĉar ekzistas nur disaj Esperantistoj kaj disaj esperantistaj organizaĵoj, sed nenia kompetenta reprezentanto de la Esperantistaro. Se, nuntempe, iaj ajn registaroj volus enkonduki Esperanton en la lernejojn de sia lando sub difinitaj kondiĉoj (ekzemple, kondiĉoj de reformoj, antaŭviditaj en la Fundamento), unue ili ne sciis al kiu ili devos oficiale sin turni, due al ili povos respondi neniu en la nomo de la Esperantistaro. La estanta situacio, pli klare kaj konvinke ol ĉia komentario montras la bezonon de centra organizaĵo por la Esperantistaro, kiu ne estas abstraktaĵo, sed reprezentas difinitan kolekton da homoj kunigitaj por la sama celo. Oni eble diros al ni, ke Esperanto estas nur lingvo kaj sekve bezonas nenan internacian organizaĵon, sed tiu argumento same kontraŭstaras al la ekzisto de ĉia societo loka aŭ nacia. Esperanto, en la nuna tempo, estas ne nur lingvo, sed *movado*, simila al multaj movadoj en la mondo: tio estas tiel vera, ke por plivastigi tiun movadon oni kreis grupojn kaj societojn, kiuj estas nepre necesaj ĝis la tago kiam Esperanto estos tutmonde praktikata; tiam ĝi estos nur lingvo. De nia unua kongreso, ĝis kiu la bezono de centra, eĉ tre libera organizaĵo estis ne sentebla, la kondiĉoj de nia afero multe ŝanĝiĝis. Nia movado fariĝis pli granda, pli serioza; ĉiam pli ofte gravaj demandoj estas prezentataj al la Esperantistoj kaj estas ne solvataj simple pro tio, ke mankas kompetenta aŭtoritato rajtigita de la Esperantistaro; kaj ju pli ni antaŭeniros, des pli ni sentos ke tia centra organizaĵo estas necesa, se ni ne volas, ke konfuzeco kaj anarkio estu la regantaj principoj de nia afero. Neniu malkonsentas, ke la nuna demando pri la Delegitaro estus pli facile kaj pli laŭleĝe solvebla, se, anstataŭ privataj homoj interdiskutantaj sen komisiono, ekzistus tia organizaĵo. Kiel ajn limigita ĝi estos, centra aŭtoritato estas natura konsekvenco de nia ĝisnuna organismo. Ĉu por ĝin krei ni atendas ĝis okazos inter ni gravaj kaj malfacile kuraceblaj malpacoj? Ĝis ni estos implikitaj en tia konfuziĝo, ke ni povos eliri de ĝi nur kun tre granda malfacileco kaj ne sen danĝero? La momento venis por ke la Esperantistaro povu en tiel gravaj demandoj esprimi sian opinion kaj diri kion ĝi ne volas. Fari tion ĝi povas nur se ĝi estas organizita kaj havas difinitajn rajtigitajn reprezentantojn. Ĝis la epoko kiam la registaroj per speciala leĝo donos al ni ĉiujn garantiojn de vivo, ni bezonas nian propran organizaĵon, kiel eble plej larĝan, kiu helpos por la konservado de nia unueco kaj nin garantios kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj, ambicioj aŭ deziroj.

Kelkaj personoj supozos, ke ni eble deziras restarigi la diversspecajn projektojn de Ligo, kiun la Bulonja kongreso ne volis. Tiu opinio estas tute ne ĝusta. La Esperantistoj tre certe ne deziras havi centran aŭtoritaton, kiu direktos la propagandon kaj sin okupos pri ĉiuj detaloj de nia movado; ili tute ne deziras havi ian aŭtoritaton, kiu iel limigus nian liberecon kaj iniciativemecon per enmiksiĝo en la vivo de niaj societoj, sed simple kompetentan reprezentantaron, kiu rajtos decidi pri la demandoj, kiuj interesas la tutan Esperantistaron kaj havas internacian karakteron. Tiu organizaĵo ankaŭ neniel celas forigi la nun ekzistantajn Centran Oficejon, Lingvan komitaton, k.t.p., sed ilin, rajtigi kaj doni al ili en la nomo de la Esperantistaro difinitan mandaton, kiun ili ĝis nun ne havas. La 'Fundamento' de Esperanto povos ankaŭ akiri per tia maniero leĝan rajtigon, kiun ĝi ne ankoraŭ posedas, ĉar ĝi estis akceptita de la Bulonja kongreso, kiu ne povis leĝofari, sed nur rekomendi; en tiu rilato tiu 'Fundamento' estus cetere tre facile atakebla.

Pri la formo de tiu centra organizaĵo povos decidi nur la Esperantistaro mem, sed ni opinias, ke por la nuna momento, oni povos starigi Esperantistan Delegitaron, kiu konsistus el la reprezentantoj de la

diversaj - propagandaj kaj fakaj - organizaĵoj Esperantistaj, elektitaj de la Esperantistaro mem, laŭ difinita proporcio; tiu Delegitaro kunvenus antaŭ aŭ dum la kongreso; ĉiu delegito rajtus letere voĉdoni, se li mem ne povas ĉeesti; por tio estas kompreneble necese, ke kelkajn semajnojn antaŭe, difinita tagordo de la traktotaj demandoj estus publike komunikata al la Esperantistaro, kiu povos ilin mature prijuĝi. La kunvenoj de tiu Delegitaro anstataŭus kun granda profito la „pseŭdo-agadajn” kunvenojn de niaj kongresoj, kie, la pasinto tion pruvis, oni povas fari nenian utilan kaj praktikan laboron. Tiu Delegitaro mem faros sian regularon kaj starigos sian labormetodon. Ni tie ĉi liveras nur ĝeneralan planon, sed ni estas pretaj ĝin pli detale klarigi laŭ okazo. (*Esperanto*, 12 decembro 1907)

\*\*\*\*\*

*[Sekvas la parolado de Hector Hodler, vicprezidanto de UEA, okaze de la solena malfermo de la 4a Universala Kongreso en Dresdono, Germanio, la 18an de aŭgusto 1908. Interesa estas i.a. la enkonduko de la nocio Esperantio kiel sinonimo de Universala Esperanto-Asocio]*

Kara Majstro, karaj Samideanoj,

Antaŭ ol klarigi al vi la organizon kaj agadon de U.E.A., estas necese rememorigi en kiaj cirkonstancoj kaj pro kiuj kaŭzoj ĝi estis fondita. Kiel vi ĉiuj scias, en la daŭro de la lasta tempo, danĝero minacis nian aferon. La momento nun estas feliĉe forpasinta - tion klare pruvas la nuna kongreso - kaj ĉar en niaj vicoj oni pli volonte kaj pli prave pensas kaj parolas pri la estonto ol pri la estinto, mi ĉi tie tute ne intencas, eĉ mallonge, preparoli la diritajn okazintaĵojn, kiuj de nun apartenas al la senpartia historio. Ĉiu movado posedas en la daŭro de sia vivo, ĉefe dum sia periodo de komenco, neeviteblajn, ofte necesegajn krizojn, kiuj utilas al tio, ke ili montras mankojn, difektojn, kiuj, eble ne vidataj dum periodo de trankvileco, enĵetiĝas al la okuloj de ĉiuj, kiam venis danĝero. La lasta krizo, kiun elportis nia afero, montris al ni diversajn mankojn, kiuj, laŭ nia opinio, reduktiĝas al la jenaj: neesto de internacia fortika organizaĵo, kuniganta ĉiujn personojn kiuj uzas nian lingvon internacian, nesufiĉeco de *materiala* fundamento, kiu ŝirmos nian movadon kontraŭ ĉia atenco kaj ĉia danĝero de disfalo. Per unu vorto, ekzistas inter niaj samideanoj forta *moral*a unueco - ĉi tiu nin savis - sed ne ekzistis ĝis nun sufiĉa *materiala* unueco. Se la unua permesas al ni venke kontraŭbatali danĝerojn kaj atakojn, la dua liveras al ni la fortojn necesajn por fari energian pozitivan laboron kaj iom post iom certe varbi al ni tiun grandan parton de la homaro, kiu bezonas lingvon internacian. Penetritaj de la neceseco krei tian organizaĵon, konvinkitaj ke ĝi estas ĉiam pli kaj pli postulata de la bezonoj de nia afero, ke tia organo estas grandega helpo por la progresado de nia movado, kelkaj iniciatintoj decidis krei la tiel nomitan U.E.A. Ĝi estis kreita ĝuste en tiu tempo, kiam ĝia bezono, pro la tiama krizo, estis pli sentebla, sed super tiu pura cirkonstanco, kiu kondukis nin al la fondo de U.E.A., ekzistas jam de longe gravaj kaŭzoj, kiuj montriĝis ne el teoriaj pripensoj, sed el la ekzameno de l' faktoj, kiuj klare pruvas, ke la momento estas oportuna por krei tiun novan organison.

Mi permesos al mi resumi tiujn kaŭzojn. Nia movado konsistis ĝis nun ĉefe el *propagando*: oni diskonigis Esperanton per diversspecaj rimedoj, kiel paroladoj, gazetartikotoj, kursoj publikaj, k.t.p.; oni sin turnis al la tuta homaro montrante al ĝi la necesecon de internacia lingvo kaj la specialajn ecojn de Esperanto, uzante ĉefe idealajn argumentojn. Dank' al tiu senlaca propagando, jam bonegaj rezultoj estis atingitaj: en multegaj lokoj, kreiĝis grupoj esperantistaj, organiziĝis publikaj kursoj, ofte kun la apogo aŭ la peto de progresemaĵoj lernejestroj; multegaj estas ankaŭ la gazetoj, kiuj nun jam ne timas publikigi artikolojn pri nia afero, kaj se en ili aperas ankoraŭ kritikaj vortoj pri nia agado - tio pruvas jam, ke ĝi estas atentinda - la nombro de la favoraj artikoloj tre superas la nombron de la malfavoraj. Fine, al ni ne mankas nun la oficialaj aproboj kaj helpoj, kiel ankaŭ pruvas ĉi tiu kongreso. Ĉion tion oni ŝuldas al la ĝisnuna fervora kaj sindona penado de tiuj samideanoj, kiuj, konataj aŭ nekonataj, per sia agado permesis al ni venki la indiferentecon de la publiko, permesas al ni ĉeesti tiajn grandiozajn neforgeseblajn manifestadojn kiaj estas niaj internaciaj kongresoj.

Venis nun la *dua* parto de nia tasko, kiu estas nur la logika kaj necesega konsekvenco de la unua, nome la *utiligo* kaj *uzado* de tiu ilo, kiun ni ĝis nun ĉie diskonigis. Ĝis nun ni turnis nin al la publiko, montrante la fasadon de nia domo; nun, ni devas montri al ĝi la internan komforton de tiu domo, la profitojn kaj preferindaĵojn, kiujn ricevos la enirintoj; se tiu domo estas senmebla aŭ se ĝi havos komfortan meblaron nur post kelkaj jardekoj, la enirintoj, trovinte nenion sufiĉe allogan por ilin enloĝigi, foriros al siaj malnovaj, sed komfortaj domaĉoj, kaj la dezirantoj eniri ne deturnos de sia vojo, sed atendos ĝis la domo estos meblita kaj plenigita je komforto. Per aliaj vortoj, oni devas labori ne nur por la propagando de Esperanto, sed ankaŭ por ĝia uzado; se oni devas pensi pri la tuta homaro, oni ne devas forgesi tiujn homojn, kiuj eniris niajn vicojn kaj ĝis nun ricevis interŝanĝe nenion. Ni rigardu ne nurlu stelon de l'estonto, kiu nin gvidis, sed ankaŭ la teron, sur kiu ni marŝas. Por nia dua tasko, nome la uzado de Esperanto, necesega estas la organizo de diversaj servoj internaciaj. Tiu laboro estis jam diversloke kaj diversmaniere kreita. En nia Ĝeneva kongreso fondiĝis fakaj societoj, kiuj celas uzi Esperanton por sia propra utileco aŭ ĝin propagandi ĉe difinitan kategorion de homoj. Aliflanke, la sama kongreso elmetis deziresprimon por la kreado de konsuloj kaj informistoj, t.e. de personoj, kiuj en ĉiu loko estus komisiataj por doni helpon kaj informojn al ĉiuj Esperantistoj, kiuj tion petas. Baldaŭ, laŭ laŭdinda stimulo, tiaj personoj ekzistis en pli ol ducent urboj. La kreo de Esperanto-Oficejoj ankaŭ multe akcelis tiun specialan movadon. Sed ne sufiĉas krei organojn, estas necese, unue ke la bezono de ili estu vere sentebla, due, ke tiuj organoj havu difinitan taskon kaj precizan planon de agado; se ne, ili estas dediĉataj al pli-malpli rapida pereco. En la nomita okazo, estis necese, ke ekzistu difinitaj servoj internaciaj en kiuj partoprenus la konsuloj, ke ilia kompetenco estu difinita, ke la publiko ilin uzanta havu por tio specialan organizaĵon. Efektive, kiu parolas pri servo, parolas pri la interŝanĝo, en kiu partoprenas du aŭ pluraj individuaj kondiĉoj de interŝanĝo. Estas fikseblaj nur akceptebla fundamento nur se la homoj partoprenantaj en ĝi, laŭ leĝa maniero, ilin fiksas, konsekvence nur se ekzistas organizaĵo, kaj ĉar tiuj servoj, pro tio ke ili uzas Esperanton estas internaciaj, tiu organizaĵo povas esti nur internacia. Aliparte, se ĉiu konsulo agas laŭ propraj al si reguloj kaj se tiuj reguloj varias de lando al alia, tiu institucio, pro sia komplikeco, estos fakte ne uzebla. Plie, laŭ la deklaro de Bulonjo, estas Esperantisto ĉiu persono kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj – sekve, de la plej honestaj ĝis la plej neonestaj. Se ĉiu konsulo devas liveri informojn al ĉiuj esperantistoj, sekve por honestaj kiel por neonestaj celoj, baldaŭ okazos sennombraj malbonuzoj kaj malkonsentoj. Stariĝas multaj aliaj gravaj demandoj. Kiel pagi la konsulon? aŭ se oni ne pagas lin, kiel postuli de li servojn? Se la konsulo rifuzas liveri servojn, al kiu oni povos plendi, kaj kiuj sankcioj ekzistas? k.t.p. Male, se ekzistas difinita asocio de personoj, uzantaj Esperanton, se, kiel en ilia organizita korporacio, tiuj personoj per la pago de kotizaĵo



havas la rajton ricevi precizajn servojn, priskribitajn per regularo farita de ili aŭ de iliaj rajtigitoj, se la personojn, kiuj liveras tiujn servojn, estas unuforme pagataj per la produktoj de tiuj kotizaĵoj, se fine por nature sin gardi kontraŭ neseriozuloj aŭ nehonestuloj, la Asocio rajtas elpeli de si la personojn, aŭ kiuj ne liveris servojn kiel ili promesis, aŭ kiuj malbonuzas ĝiajn servojn, ĉiuj tiuj maloportunaĵoj nature malaperas, solvitaj tre simple per asociiĝo de homoj havantaj saman celon kaj bezonon. Tio klarigas gravan diferencon ekzistantan inter *Esperantisto* kaj tiu, kiun ni provizore nomas *Esperantiano*. Por uzi komparon, mi diros, ke Esperantisto estas simila al ĉiu persono, kiu scias kaj uzas ekzemple anglan lingvon por kiaj ajn celoj, dum Esperantiano estas komparebla al tiu homo, kiu apartenas al angla nacio, havas difinitajn rajtojn kaj devojn al ĝi, uzas ĝeneralajn servojn organizatajn de liaj rajtigitoj kaj komunajn al liaj samnacionoj. Ni iom longe insistis pri tiuj difinoj, kiuj nun ŝajnas eble superflujaj, sed en baldaŭa tempo estos necesegaj. Mi ankaŭ speciale aludis la temon de la konsuloj, pro tio ke ĝi estas plej bona ekzemplo de la neceseco de difinita internacia organizaĵo kaj la konsularo estas, por tel diri, la fundamento de UEA.

Sed en multaj aliaj kampoj, ekzistas tre multaj praktikaj aplikaĵoj de Esperanto, de la ŝajne plej bagatelaj ĝis la plej gravaj, kiuj postulas internacian organizaĵon. Mi limigos min nur per cito de la plej ĉefaj kaj materialaj.

Vi ĉiuj konscias, ke unu el la plej necesaj aplikaĵoj de Esperanto estas en la fako turismo. Se nuntempe la vojaĝoj estas facilaj, ili tamen prezentas nekalkuleblajn malhelpojn pro la diverslingveco. Estus plej granda helpo, se en ĉiu loko troviĝus difinita persono, komisiita por doni la bezonatajn informojn al la trapasantoj. Tio estas la speciala tasko de niaj diversaj konsuloj. Necese estas, ke en ĉiu iom grava loko, ekzistus difinita ejo, ĉe kiu la fremdulo povos iri por ricevi, ĉu parole, ĉu per Esperante redaktitaj gvidiloj, la plej urĝajn sciigojn. Utilega estas ankaŭ agado de la hotelistoj, informoficejoj k.a. Pri tiu temo nenio serioza kaj daŭra estas farebla sen la grava korporacio, kiu faros la necesajn klopodojn kaj povos liveri certajn garantiojn, en la nomo de tiuj homoj, kiuj uzos la favorojn, kiujn ĝi petas.

Al turismo ankaŭ apartenas la starigo de karavanoj kondukantaj vojaĝantojn de unu regiono al alia. Por ilin organizi kaj en ĉiuj klopodoj necesigitaj por la ricevo de la bezonataj favoroj, komuna organizaĵo estas absolute necesa, ĉar ĝi povas plenrajte trakti en nomo de difinita kolekto da homoj, kaj, interŝanĝe de la favoraj petitaj, povos ion promesi kaj doni, kaj ju pli vasta kaj diversa estos la agadkampo de tiu Asocio, despli atentindaj estos la profitoj, kiujn ĝi povos liveri kaj despli gravaj konsekvence la profitoj, kiujn ĝiaj anoj povos ricevi. En turisma fako oni ankaŭ povos faciligi, de lando al la alia, la interŝanĝadon de junuloj, kiu havas tiel gravan influon por la plibonigo de la intergentaj rilatoj, kreadi libertempajn koloniojn, kie dum kelka tempo kunvenos diversregionaj Esperantianoj ktp.

La komercistaro ankaŭ plej bezonas lingvon internacian, kaj malgraŭ tio, ĝi ankoraŭ tre malmulte aliĝis al nia afero; diversaj izolaj klopodoj estis faritaj laŭ tiu direkto, sed ne plene sukcesis. Tute alie fariĝos, kiam ekzistos grava organizaĵo internacia, kiu samtempe povos entrepreni klopodojn en ĉiuj landoj kaj povos al la komercistaro konigi precizajn kaj nunajn profitojn, eĉ negravajn, sed certajn, kiujn havigos al ili Esperanto. Eĉ en la kampo de instruado, organizaĵo kiel UEA tre multe helpos. Ĝi ne sin okupos pri la detala organizado de la diversaj Esperanto-kursoj, sed penos kunligi ilian agadon kaj ĝin utiligi al tiu farita en aliaj fakoj, kiel komercistoj, hotelistoj, aferistoj ktp. Ĝis nun oni instruis Esperanton al ĉiuj personoj kiuj deziris ĝin lerni; nun, oni penos instrui ĝin ĉefe al tiuj, kiuj pro sia aktiva partopreno en tia aŭ alia fako de la vivo internacia, bezonas Esperanton kaj povos tuj ĝin uzi.

Ekzemplon mi povus plimultigi en ĉiusecaj kampoj. Ĉie ni konstatis, ke por la serioza organizo kaj uzado de tiuj peresperantaj servoj, oni bezonas internacian organizaĵon, kaj ĉar tiuj servoj estas intime ligitaj unuj kun la aliaj, ĉar en la diversaj okazoj de sia vivo, sama homo bezonas pli ol unu el tiuj malsamaj fakoj, estas necese, ke por ĉiuj servoj, kiuj en la realeco estas nur diversaj aspektoj de sama ideo, estu starigata *unu* organizaĵo, kiu enhavos iom post iom ĉiujn homojn, kiuj bezonas difinitajn servojn kaj konsekvence havas inter si ligilojn de solidareco. *Tiu organizaĵo estas Universala Esperanto-Asocio aŭ Esperantio*; ĝiajn anojn ni nomos *Esperantianoj por ilin diferencigi de nunaj Esperantistoj*, kiel supre dirite. Por tiu celo ĝi uzas la lingvon Esperanto tian, kia ĝi rezultas el sia fundamenta verkaro, ne ĉar tiu lingvo estas por ĉiam la plej perfekta, sed ĉar el ĉiuj proponitaj lingvoj internaciaj, la formo nomita Esperanto estas la sola, kiu estas la plej disvastigata, sekve la plej praktika, ĉar ĝi per la uzado sin montris tute taŭga por sia celo, ĉar fine Esperanto naskis tiun specialan movadon socian, nomatan Esperantismo, kies fundamentajn ideojn plene akceptas UEA. Konsekvence ĝi ne okupiĝas pri teoriaj lingvaj diskutoj kaj pro tio, ke ĝi nepre bezonas sian lingvon, ĝi al neniu konsentas la rajton trudi al ĝi ŝanĝon de la fundamentaj principoj de tiu lingvo, pro tia aŭ alia kaŭzo.

Tute neŭtrala rilate al demandoj politikaj, socialaj, religiaj aŭ naciaj, UEA celas esti nur fundamento neŭtrala, sur kiu povos labori ĉiuj homoj, kiuj iel partoprenas en la civilizacio universala, per kiu ili povos reciproke helpadi kaj utiladi al si, per kiu ili plifortikigos la ligilojn de solidareco, kiujn naskos tiu senĉesa interrilatado.

Tiu deklaro estas necesa por klare montri, ke UEA ne estas unuforma organizaĵo trudota al la tuta Esperantistaro - kio cetere estus neebla. Ĝi celas nur la uzadon kaj utiligadon de Esperanto, ĝi turnas sin al ĉiuj homoj, kiuj aprobante ĝian celon, juĝante, ke aliĝo al ĝi utilos al ili, deziras partopreni en ĝiaj laboroj. Oni povas esti bonega Esperantisto, t.e. bone koni kaj uzi nian lingvon, kaj ne esti Esperantiano, same kiel oni nuntempe povas sin diri Esperantisto kaj uzi nian lingvon kontraŭ nia afero...

El la supre dirito, sekvas, ke UEA, kiu ne estas propaganda societo, ne povas esti kuniĝo de la nun ekzistantaj propaganda] societoj. Laŭ nia opinio, propagando devas resti loka aŭ regiona afero, ĉar ĝi varias laŭ la lokaj kondiĉoj; ĝin centraligi estas malhelpi ĉian iniciaton, kaj nepra kondiĉo de propagando estas libera iniciato kaj agado de ĉiuj ! Male, kiel ni vidis, por internaciaj servoj, internacia organizaĵo estas necesega. Memkompreneble, kvankam UEA ne senpere propagandas Esperanton, ĝi per sia agado multe plifaciligos la taskon de la propagandistoj, montrante ke oni jam nun povas lerni Esperanton ne nur por amo al ĝi, sed pro la utileco, kiun ĝi havigas.

Post tiuj iom longaj, sed por la kompreno de la afero necesaj klarigoj, konvenas nun konigi, kio estas la organizo de UEA, kion ĝi faris kaj kion ĝi faros. Ni ĝis nun konsideris la teorion; ni nun vidu la enkorpiĝon de tiu teorio.

UEA estis fondita de privata iniciato en monato marto. Ni tiam petis, ke ĉiuj grupoj, kiuj aprobas la celon de UEA, bonvolu regule baloti Delegitojn. Multaj favore respondis nian alvokon, kaj, iom poste, ni submetis al la elektitaj Delegitoj projekton de provizova regularo, kiu estis akceptita ! Tiun regularon baldaŭ anstataŭos pli plena regularo, laŭ la spertoj faritaj, kaj diskutota dum niaj ĉitieaj kunvenoj. Ni mallonge konigos ĝian esencon: Estas membro de UEA ĉiu persono, kiu pagas la jaran kotizaĵon difinitan per la voĉdono de la Delegitoj kaj deziras aliĝi. Ĉiu membro ricevas karton, kiu donos al li la rajton uzi tiujn

servojn organizatajn UEA kaj plendi al la komitato, se li ne ricevis la servojn, kiujn li rajtas. La membroj de sama regiono balotas Delegiton kaj Vicdelegiton, kiuj havas la taskon zorgi en sia loko pri la administraj aferoj de UEA kaj la starigo de ĝiaj servoj. Por ĉi tiu celo li sub sia respondeco elektas la necesajn helpantojn, nomatajn konsuloj aŭ informistoj. Kiel pagon por sia laboro, la Delegito kaj liaj helpantoj ricevas la trionon de la kotizaĵoj de sia regiono. Por ke UEA havu reprezentantojn en kiel eble plej multaj lokoj, eĉ negrandaj, la Delegito elektas Subdelegitojn, kiuj faras al la membroj de UEA la samajn servojn kiel Delegitoj. Fine, la Delegitoj balotas por difinita daŭro komitaton, kiu de nun konsistos el 7 anoj. Ĉiu komitato zorgas pri speciala fako. Ĝis nun ekzistas nur 3 fakoj, sed laŭ la nova regularo, tiu nombro estos altigata ĝis sep per divido de malnovaj kaj kreo de du novaj, La Delegitoj mem ricevas ĉiujn komunikojn de la Komitato, kiujn ili devas respondi tre precize en difinita tempolimo. Por doni plenan eblecon al ĉiuj iniciatoj libere agadi kaj labori por la prosperigo de UEA, ĉiu Delegito havas iniciatraĵon, kaj, laŭ simpla maniero, povas submetigi propran projekton al la ĝenerala voĉdonado de ĉiuj delegitoj. Tia organizo estas videble tre liberala, kaj en ĝi ĉiu povos libere esprimi kaj triumfigi siajn opiniojn aŭ projektojn per vojo facila kaj leĝa; sur tiu fundamento UEA povos senĉese pligrandigi kaj aldoni al si novajn fakojn kaj novajn servojn tute normale. Por plenigi tiun skizon ni aldonas, ke ĉiuj Delegitoj kaj Subdelegitoj enpresigas en komunan gazeton ĉion, kio koncernas ilian regionon kaj havas internaciajn karakteron. Kiel sankcioj, ĉiuj Delegitoj aŭ reprezentantoj de UEA, kiuj estis kaŭzo de plendo aŭ ne respondis dokumentojn al ili senditajn, estas citataj sur la oficiala organo, kaj post ripeto de tia faro, la membroj de ilia regiono estas pretataj baloti anstataŭanton.

Kion jam faris UEA? Ĝi unue devis organiziĝi: fondita oficiale la 1an de Majo, kun ĉirkaŭ 60 Delegitoj kaj neniuj membroj, ĝi ĉiutage plej ĝoijge kreskis. Tri monatojn post sia fondo, malgraŭ la malfavora sezono kaj la malhelpoj, kiuj ordinare trafas ĉian novaĵon, ĝi posedas pli ol 200 Delegitojn, 80 Vicdelegitojn, 100 Subdelegitojn kaj 1300 anojn pagintajn la kotizaĵon por ĉi tiu jaro. Tiun kontentigan kaj kuraĝigan rezultaton ni ŝuldas al multaj sindonaj amikoj, konataj aŭ nekonataj, kiuj, kompreninte la utilecon de UEA kaj ĝian signifon por la estonteco de Esperantismo tuj agis por ĝi, kaj ni deziras ĉi tie ilin danki tutkore por ilia necesega kaj fervora laborado.

La unua tasko, kiun trudas al si la fako 2a de UEA, difinita por Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj, estas la starigo de tiuj institucioj en ĉiuj lokoj, kie ekzistas UEA-Delegitoj. La tasko de la diversfakaj konsuloj konsistas en tio, ke ili liveras informojn al ĉiuj Esperantianoj, kiuj tion petas. Esperanto-Oficejo estas ejo, kien oni elcentrigas ĉion, kio koncernas Esperanton en sama loko. En tiu kampo oni jam atingis tre kontentigajn rezultatojn: jam nuntempe en 70 urboj ekzistas tiaj institucioj organizataj tute laŭ la plano liverita de UEA; en multaj aliaj oni laboras por la starigo de tiuj necesaj institucioj. Jam ŝatinda nombro de lokoj posedas Esperante redaktitan gvidilon donotan al la trapasantoj kaj havantan la plej necesajn informojn por helpi lin dum lia restado. De nun, oni povas diri, ke en pli ol 250 lokoj, Esperantiano povos ricevi, ĉu informojn, parolajn aŭ skribajn, ĉu aliajn servojn ĝis nun organizitajn de UEA, per niaj Delegitoj kaj Subdelegitoj. Pli plenajn sciigojn pri tio la interesato cetere povos legi en la jarlibro eldonata de nia Asocio, kaj dank'al kiu ĉiu Esperantisto povos vojaĝi sen la antaŭaj malfacilaĵoj aŭ sen la timo ĝeni Esperantistojn dum sia haltado ĉe ilia urbo.

Fine, rilate al turismo, la fako IIIa de UEA, en la celo plifaciligi la veturon de Esperantianoj al la IVa Kongreso, organizis kvar karavanojn, kiuj, malgraŭ ke ili estis rapide organizitaj, kunigis pli ol 200 partoprenantojn.

Aliparte multaj personoj komencas kompreni ke Esperanto estas mirinda ilo por konigi difinitan regionon al la tuta mondo. Kiel Esperantolingvo rebrilas la apartaĵojn de ĉia nacia lingvo kaj estas kvazaŭ ŝlosilo por penetri en ilin, tiel same Esperanto, kiel interkomunikilo, permesas al ni konatiĝi kun la apartaĵoj de tia aŭ alia regiono, kun la specialaj moroj kaj kutimoj de tia aŭ alia gento. Por tio, UEA, kaj ĝiaj Delegitoj instigas al la eldonado de gvidlibroj diskonigantaj ilian regionon laŭ la diversaj vidpunktoj, kiuj faras ĝin interesa. Jam ŝatinda nombro de grupoj eldonis tian libreton, kaj UEA zorgos, ke baldaŭ ĉiu regiono havu tian. Por diskonigi la ekziston de UEA, ni per niaj Delegitoj presigis en pli ol 400 ĉiulingvaj naciaj gazetoj saman artikolon, kiu liveris bonajn rezultatojn. Tio estas plua pruvo de la utileco de internacia organizaĵo, kiu rilate al la publiko povos efike per la neesperantista gazetaro, kiu plivolonte akuptas precizajn artikolojn kaj informojn, ol longajn diskutojn pri la problemo de lingvo internacia.

Kion nun faros UEA? La programo, kiun mi komence priskribis pri internacia organizaĵo, respondas tiun demandon. Ĝi unue penos konstante pligrandiĝi kaj plivastigi sian kampon de agado. Por ke la servoj estu fruktodonaj, por ke UEA estu potenca, estas necese, ke ĝi estu multenombra. Tial ni entreprenos energian agadon por plimulti la nombron de niaj Delegitoj kaj membroj. Je tiu okazo, ni alvokas al ĉiuj grupoj, kiuj aprobas nian celon kaj deziras partopreni en nia agado, ke ili bonvolu elekti Delegitojn, ke ĉiuj izolaj Esperantistoj, kiuj deziras laŭeble nin helpi, akceptu la taskon de Subdelegito. Ju pli potenca kaj pli grava estos UEA, des pli multenombraj estos la servoj, kiujn povos ricevi ĝiaj membroj kaj des pli kreskos la ulileco de Esperanto.

Ni ankaŭ plue laboros por la Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj, zorgante, ke en ĉiu loko tiuj institucioj estu organizitaj laŭ unuforma plano kaj povu liveri ĉiujn servojn postuleblajn de ili. Per la Konsuloj la aplikaj praktikaj de Esperanto povas fariĝi sennombraj. Ni kreas apcialajn servojn por junuloj, aparte studentoj, por virinoj kaj por maristoj. Oni scias, ke ĉiujara granda nombro de junuloj apenaŭ elirintaj el la lernejoj, forvojaĝas eksterlanden en la celo lerni la naciajn lingvojn kaj plenumi siajn studojn. Sed kiu povas aserti, ke eĉ post kelkaj jaroj de lernado en gimnazio povos tuj sin komprenigi al la enlanduloj, ĉe kiuj li ekloĝas, kaj ĉefe ilin kompreni! Kaj kiu ne scias kiom da danĝeroj timas la gepatroj, sendante siajn infanojn en nekonatan landon. Por la membroj de UEA, tiuj temoj jam ne ekzistos. Ili rekomendos siajn filojn al niaj Delegito-Konsuloj, konigos al ili siajn dezirojn: kaj la diritaj delegitoj per la helpo de speciala Konsulo por junuloj zorgos por ke la alvenanto trovu pensionon, prezentos lin al junaj Esperantianoj de sia urbo, kun kiuj li, per Esperanto, tuj povos informiĝi pri la lokaj kutimoj kaj moroj, ricevi konsilojn pri la lernado de la enlanda lingvo, kaj iom post iom alkutimiĝi al ĝia uzo. La Konsulo por junuloj helpos al ili por trovi oficon kaj oni povas antaŭvidi, ke baldaŭ komercistoj, firmestroj kutimos konigi al niaj Delegitoj kiujn oficistojn ni hezonas. En la universitataj urboj la konsulo por junuloj estos prefere studento; li estos plej utila al la Komitato por helpo al fremdaj studentoj, kiu ekzistas en preskaŭ ĉiuj universitataj urboj; li fine povas instrui la fondon de studenta grupo esperantista kaj la kreon de kurso de la enlanda lingvo per Esperanto.

Por sinjorinoj kaj fraŭlinoj, kiuj vojaĝas solaj en fremda lando, ni jam havas kaj penos konstante havi en ĉiu urbo specialan konsulinon, kiu ricevos la vojaĝantojn, zorgos pri ilia komforto kaj helpos al ili per konsiloj ĉefe se ili deziras trovi oficon. La rolo de tiuj konsulinoj estos simila al tiu de la societoj por protektado de fraŭlinoj, sed multege pli facila pro la lingvo komuna al ĉiuj helpantinoj kaj helpatinoj.

En ĉiuj marhavenoj, ni penos havi specialan Konsulon, kiu povos doni ĉiujn necesajn informojn al maristoj kaj marvojaĝantoj. Laŭ la postulo de la bezonoj kaj la plidiversiĝo de la petoj, oni povos ankaŭ

kreadi alifakajn konsulojn. Ju pli ni iras antaŭen, des pli ni konvinkiĝas, ke la sistemo de la konsuloj aŭ informistoj estas fonto de multegaj utilaj aplikaĵoj.

En la fako turismo, UEA organizos aŭ organizigos karavanojn, ĉu por festoj kaj kongresoj Esperantistaj, ĉu por okazintaĵoj, havantaj internacian kaj neŭtralan karakteron. Ĝi starigos en pentrindaj lokoj sur la monto aŭ borde de la maro libertempajn koloniojn, kie diversregionaj samideanoj povos kune pasigi sian libertempon, ĝi entute klopodos por ĉiamaniere plifaciligi kaj plifortigi la renkontojn inter siaj membroj. Pri sama temo, ni penos agadi ĉe la hotelistoj, laŭ preciza plano, kaj starigi liston de fidinda Esperanto-hotelaro, same kiel agis la diverslandaj Turingklubaj societoj.

UEA kreos specialan fakon por komerco, industrio kaj dungado. Pli ol ĉiu alia, komerco bezonas komunan centrejon. La fako komerca de UEA estos kvazaŭ internacia komerca ĉambro, kiu per siaj ĉiulokaj konsuloj havas tiom da filioj kaj korespondantoj, kiuj penos utili al la lokaj komercistoj kaj industriistoj, konigi la specialajn produktaĵojn de sia regiono kaj faciligi ilian disvendadon. Servo de dungado estas ankaŭ utiliga, kaj UEA organizos tian, por siaj membroj, laŭ la samaj principoj.

En pli malproksima tempo UEA ekzamenos la kreon de speciala Mutualo por siaj membroj, de Esperanto-banko kaj Esperanto-papermono kiel pagilo, kiuj fariĝos nepre necesaj institucioj tuj kiam funkcios niaj diversaj servoj. En alia kampo, ni povos ankaŭ organizi ĉiujaran feston, publikan manifestadon en la honoro de la kreanta ideo de Esperantismo. Proprigante al ni la parolojn de nia Majstro ĉe la IIIa kongreso, ni diras: „Ĉio kio kondukas al rompadon de la muroj inter la gentoj apartenas al [Esperantio]; ...ĉion tion ĉi ni povos prijuĝi, akcepti aŭ neakcepti, sed ni neniam devos ĝin blinde forĵeti antaŭe, ĉar ĉio, kio servas al la fratigado de la gentoj kaj al la rompo de la malamikaj muroj inter la popoloj - se ĝi nur ne enmiksas vin en la internan vivon de la gentoj - apartenas al UEA”, ĉar, ni aldonas, la celo de UEA estas la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĉiugentaj homoj kaj ilia alproksimigo per Esperanto.

Por ĉi tiu vasta tasko ni bezonas la kunlaboron de ĉiuj samideanoj. Ne mankis la laborantoj en nia ĉiam grandiĝanta Esperantujo, sed tro ofte ili dise laboris, unu aparte de la alia. Nuntempe, ekzistas tiu komuna fundamento, sur kiu povos harmonie kaj orde labori ĉiuj bonvoluloj, nome Universala Esperanto-Asocio. - Ni ne tro turnu niajn okulojn al la potencoj eksteraj kvazaŭ do ili povus veni la venko. La venko de Esperantismo ne venos de la mondo ekstera, oficiala aŭ scienca, se ĝi ne unue plene komprenis la esencon de Esperantismo; la venko estos la propra kaj la sola verko de tiuj homoj, kiuj konsciaj pri sia celo sin organizis kaj laboris senĉese kaj sen flankaj diskutoj, por la efektivigo de ĉi tiu celo, sekvante la vojon elektitan. Nur per nia propra laboro, ni rompos la graniton de l'mondo.

Samideanoj,

En la daŭro de mia tro longa parolado, mi ofte kaj speciale aludis la praktikan flankon de UEA kaj donis ekzemplojn materialajn, ĉerpitajn el la vivo ĉiutaga, sed ĉu tio signifas, ke ni iel malŝatas aŭ flankelasas la idealan flankon de Esperantismo? Tia tute ne estas kaj ne povas esti nia opinio, se ni estas konsciaj pri nia agado. Ni, male; estas profunde konvinkitaj, ke la materiala flanko de nia entrepreno pli kaj plicerte valorigos la idean, grandegan signifon de Esperantismo, de ĝia interna ideo. Ni estas profunde konvinkitaj, ne laŭ puraj impresoj kaj sentoj, sed laŭ faktoj, ke Esperanto ne nur estas sistemo de lingvo pli-

malpli perfekta, sed, ĉefe kaj super ĉio, *socia* movado. Tion ni sentis de la momento kiam ni iom profunde konatiĝis kun la movado de Esperantismo. Tion ni sentis en niaj modestaj, sed impresantaj festoj esperantistaj, tion ni sentis en la momento de la krizo kiam por nin gardi de la delogoj kaj danĝeroj niaj samideanoj vokis en la nomo de la fideleco al Esperanto kaj ĝia interna ideo, tion ni ankoraŭ pli klare sentas meze de niaj ĉiujaraj kongresoj, en la koro de Esperantujo; tion esprimas nia flago, niaj kantoj, nia literaturo. Oni povas aprobi aŭ neaprobi tiun movadon; ĝi ekzistas kaj pli kaj pli sin trudos al nia atento, dum niaj hodiaŭaj lingvaj diskutoj aperos pli kaj pli palaj kaj malgravaj. Esperanto liveras tiun neŭtralan fundamenton, sur kiu ĉiuj homoj, kiuj iel ajn partoprenas en la vivo internacia, ĉu pro ideoj, ĉu pro materiaj celoj, povas facile kaj plenkonsente interkomunikiĝadi. *Esperantio* per la kreo de servoj internaciaj, plifortikigos kaj plirealigos la solidarecon inter diversgentanoj, kaj ĝin konsistigos en la reciproka sinbezonado kaj sinhelpado. Laborante por la iompostioma efektivigo de tiuj servoj, plimultigante, plifaciligante, plioftigante la rilatojn inter la homoj, UEA konscias efektive labori por la frateco inter diversgentanoj, ne por tiu frateco, kiu ekzistas nur en vortoj aŭ konfuzaj antaŭsentoj do niaj animoj, sed por liu frateco, reala, nediskutebla, neŝirebla. kiu rezultas de la reciproka bezono, utilado kaj sinkonado. Tiel same kiel regnantoj de unu sama regno, malgraŭ siaj ĉiuspecaj diferencoj, gustoj, rangoj, opinioj, havas inter si ĉiutagajn nerompeblajn ligilojn, havas ion komunan kiu estas kvazaŭ parto de ilia propra individuo. Tiel same ni celas al tio, ke inter homoj diversnaciaj kaj diversgentaj, malgraŭ iliaj malsamaj opinioj, moroj, kutimoj, eĉ malkonsentoj, ekzistu tia sama sento de solidareco, nerompebla ĉar ĝi havas kiel fundamenton la ĉiutagan bezonadon. Al tiu supernacio, ni ĉiuj konscie aŭ nekonscie celados, kaj por la starigo de tiu vastega konstruaĵo, kiu ellaboriĝos en la daŭro de la jaroj venontaj, ni ĉiuj metu nian modestan, sed necesan ŝtonon, kaj baldaŭ, per nia konstanta kaj orda laboro, veriĝos la profetaj paroloj de Zamenhof:

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento,  
Unu grandan rondon familian.

\*\*\*\*\*

*[Sekvas unuopaj eltiraĵoj el diversaj postaj artikoloj de Hector Hodler pri la karaktero de UEA kaj la devoj de la esperantistoj]*

Dum longa tempo ni turnis nin al la publiko, montrante al ĝi la ĝeneralan signifon de la problemo pri lingvo internacia, la diversajn solvojn proponitajn kaj la estontan utilecon, kiun al la tuta homaro alportos tiu nova ilo, kondiĉe ke ĉiuj enviciĝu en nia afero. Kiel procedis niaj propagandistoj, ĉu en la paroladoj, ĉu en la multegaj artikoloj verkitaj de ili? Ili komence montris la necesecon de lingvo internacia, klarigis kial (pro teoriaj kaŭzoj) lingvo internacia povas esti nek mortinta lingvo, nek racia lingvo, fine kiel Esperanto, pro ĝia simpleco, ĝia logikeco, unuvorte ĝiaj lingvaj ecoj, kaj lastatempe, pro ĝia jama disvastiĝo, estas la sole bona solvo de la problemo, ke, konsekvence, ĉar lingvo internacia estus utiliga al la tuta homaro kaj Esperanto estas la plej bona solvo, ĉiu homo havas la moralan devon lerni Esperanton kaj ĝin disvastigi. Oni postulis de

la publiko ian penadon por afero pure eventuala kaj estonteca : interŝanĝe oni proponis al ĝi aŭ nenion, aŭ tute ne certajn kaj ne precizajn profitojn. (...) ni (...) varbis precipe homojn sindonajn, kiuj lernis Esperanton por ideala celo kaj pro amo al la ideo mem. (...) Ni ofte varbis tiujn homojn, kiuj, post la fino de sia labortago, volonte sin okupas pri Esperanto, tre interesiĝas pri teknikaj lingvaj detaletoj, sed, fakte, estas tre malmulte interesataj en la vivo internacia, sekve, ne povas uzi Esperanton. Se nuntempe kiam nia movado ekfariĝas pli konforma al sia celo, tiuj personoj nin forlasas, ĉar Esperanto jam ne liveras al ilia amatoreco tiom da okazoj por lingva diskutado, tio estas fakto normala, pri kiu ni ne devas malĝoji. Unuvorte, ni ĝis nun konsideris nian movadon kiel pure lingvan aferon: ni do per tio vole plimalgrandigis la publikon de niaj varbotoj kaj metante antaŭ ĉio la lingvan flankon de nia entrepreno forlogis de ĝi multajn praktikajn homojn, kiuj konsentas dediĉi kelke da tempo al la lernado de Esperanto nur kiam ili alimaniere povos regajni tiun tempon. (...)

(...) kreiĝis organizaĵo, kiu starigis kaj starigos diversajn servojn, tuj uzeblajn de tiuj homoj, kiuj en tia aŭ alia fako partoprenas en la vivo internacia kaj bezonas rilati kun aligentanoj. (...)

La varbitoj lernos do Esperanton por ricevi la priparolitajn servojn, ĝi plaĉas al ili aŭ ne, tute kiel oni lernas ian ajn fremdan lingvon, kaj inter pluraj formoj de lingvo internacia ĉiu saĝa homo elektos tiun, kiu estos al li plej utila. (...) La socia karaktero de nia movado, jam konkretigita de niaj diversaj servoj, multe pli intereso la popolamasojn, ol longaj klarigoj pri la helplingva problemoj kaj ĝiaj diversaj solvoj, kiuj altiras plej ofte nur sciemulojn aŭ kelktagajn entuziasmulojn. Oni ankaŭ forlasu la blufon de la nomoj de eminentuloj, sciencaj aŭ registaraj, kiuj okaze ellasis favorajn vortojn pri Esperanto, sed praktike tre malmulte interesiĝas pri ĝi. (*Nova tempo – novaj metodoj*. En: *Esperanto*, 20a februaro 1909, n-ro. 49).

(...) Dank' al tiu racia organizo [UEA], Esperantismo certe, nerezisteble plipotenciĝos kaj, tiel armita, iom post iom sin trudos al la ekstera mondo; dum pli kaj pli elbrilos ĝia socia rolo. Oni tiam ankaŭ konstatos, ke la ideo pri supernacio ne estas fantaziaĵo de frenezulaj cerboj, sed estos enkorpigita en materiala formo kaj nenio jam povos ĝin detrui, ĉar inter ĝiaj anoj ekzistos tiuj fortikaj ligiloj, kiujn kreas harmonia organizo, gvidata per difinita celo. (*La Organizo de nia Movado II*. En: *Esperanto*, 20a marto 1909, n-ro 51)

(...) Kiam ni parolas pri Esperantismo, ni celas Esperantismen en ĝia plena socia signifo, laŭ la penso de ĝia kreinto, ne en ĝia pure lingvistika mallarĝa interpreto, kiu estas nur speciala flanko de la problemoj. (...) Nia movado, resume, havas kun si ĉiujn kondiĉojn de venko: ĝi okazos en la plej taŭga tempo, ĝi havas altan idealon, ĝi nun havas organizaĵon, kiu ebligas utilan kaj certan laboron. (*Nia Agado II*. En: *Esperanto*, junio 1909, n-ro 56)

(...) Esperantio estas en tiu situacio: Ĝia idealo estas la idealo mem de Esperantismo: krei tiun neŭtralan fundamenton sur kiu komuniĝos senaltrude tiuj homoj, kies rigardo celas trans la ĉiam pli mallarĝaj limoj de ilia lando aŭ sekto; serĉi inter la homoj kaj la popoloj tion, kio estas komuna kaj pure homa, kaj al ĉi tio doni konstantanecon per starigo de organizaĵo, kiu konkretigos tiujn principojn kaj per tio ilin enradikigos en ĉiun sian membron. (*Oficiala Raporto ĉe la Kunveno de UEA en Barcelono*. En: *Esperanto*, oktobro 1909, n-ro 63)

La vivo de ĉiu movado estas batalo inter unueco kaj diseco. Se la unua superas, tiam la movado kreskas je propra forto kaj progreskapablo. Se superas la alia, al certa kaj baldaŭa morto iras tiu movado. Sed ĝuste tial ke unueco kondukas al sukceso kaj ĝin kondiĉas, ĝi estas tiom pli malfacile atingebla, kaj ĝi estas malfacila, ĉar ĝi duoble postulas de ĉiu homo, ke li en si mem disciplinigu siajn pensojn kaj fortojn, ke li kiel individuo discipliniĝu al individuaro. La diseco ne estas tiel postulema: ĉiu homo agu laŭ sia plaĉo, siaj apetitoj, sia propra fantazio. La homo de l'unueco zorgas nur pri siaj devoj: la homo de l'diseco nur pri siaj rajtoj. Tre certe tiaj absolutaj tipoj ne ekzistas. En ĉiu homo batalas unueco kaj diseco pli-malpli konstante, sed dum ĉe iuj unueco ĉiam emas superi disecon, la aliaj metas disecon antaŭ unueco.

Same en ĉiu movado, kiu volas vivi: unueco devas ĉiam superi disecon, kaj ju pli la tasko de tiu movado estas grava kaj malfacila, des pli postuliĝas la supereco de l'unueco pri ĉiuj esencaj punktoj.

Kvankam plej diversa pri tio, kion la homoj kutimas konsideri kiel ĉefan unuecon – raso, nacio, gento – la Esperantistaro havas tamen grandan unuecon: unuecon lingvan – sur kiu fondiĝas ĝia ekzistado – per Esperanto; unuecon idealan per Esperantismo, unuecon organizan per UEA. Tiuj unuecoj estas solidaraj unu de la alia. (...)

Nia lingva unueco, unue formita, estas la plej certe starigita. (...)

Malpli preciza kaj malpli forta estas nia ideala unueco. Ĝi tamen ne estas kontestebla. Ĝis nun ĝi estas pure senta: simpatio, solidareco, pli vere samideaneco, jen el kio konsistas la interno idea de la Esperantismo. Sed la esenco de Esperantismo estas ĝia speciala solvo de la intergentaj rilatoj, ĝia aparta kompreno de internacieco. En tiu rilato malmulto estas farita, ĉio restas farota. Kiom da Esperantistoj daŭras pensi nacie kaj ne povas sin levi super sia nacia juĝo? (...)

(...) Ni havas sufiĉe da talentaj instruantoj pri Esperanto, sed kiom da *edukantoj* pri Esperantismo? (...)

Ni bezonas kelke da homoj penetritaj de la alta signifo de Esperantismo, homoj kiuj komprenigus al la Esperantistaro la socian valoron de Esperantismo, kiuj aplikus ĝin al la diversaj problemoj de la internacia vivo, kiuj helpus la kreon de tiu komune-homa kulturo, ĉerponta sian vivsukon el Esperantismo kaj radionta super niaj gentaj kulturoj. Tio estas, ni konfesas, grandega tasko, kiu ne estos plenumata en kelkaj jaroj; sed tio ne devas esti preteksto por ĝin neniam komenci. (...) [UEA] estas ekzemplo de realigo de la Esperantisma idealo. (...) (*Unueco*. En: *Esperanto*, januaro 11, n-ro 92).

(...) Ofte la nombro de samfakanoj, kiujn oni celas kunigi, estas tro malgranda. La kunezistado de tridek personoj de la sama profesio en Esperantujo ne sufiĉas por pravigi la fondon de nova societo. Se tiuj personoj deziras interrilati ili tion povas facile fari sen societo. Sama eraro estas fondi gazetojn fakajn – devige seninteresajn – por kelkaj dekoj da personoj. La sistemo de la rondirantaj kajeroj permesas multe pli fruktodonan interkomunikadon.

Due: manko de agadplano. La fondantoj de societo devus kompreni, ke ili havas respondecon. Senripense fondi societon dum agrabla kongrestago signifas nenion, se oni ne klare difinas al si planon de laboro. Sufiĉas ĉeesti fakajn kunvenojn de la lastaj kongresoj por konstati, ke oni tie malvolvis multajn



ideojn, sed malmulte decidis. (...) Tiu societoj estas plejparte pure propagandaj. Anstataŭ propagandi Esperanton en iu loko, oni ĝin propagandas internacie en iu profesio, kio cetere estas pli malfacila. (...) Pura propagando kondukas al nenio. La sola efika propagando estas tiu, kiu rezultas el la uzado kaj kiu estas intime kunligita kun ĝi. (...)

(...) Oni kunlaboru kun UEA, anstataŭ fondi novajn entreprenojn, subtenu tion, kio ekzistas, ĝin plibonigu per la uzado, evitu senutilajn klopodojn, donu al utila agado tion, kio tro ofte estas dediĉata al simpla administrado kaj al organiza laboro jam farita. (...)

(...) La progresoj de Esperantismo estos ŝuldataj ne al tiu fakto, ke la derivado de Esperanto estas renversebla aŭ ne, sed al tio, ke ni estos kiel eble plej trafe organizataj por utila kaj harmonia agado. Ju pli da laborkapabluloj bone direktitaj, des pli da tagoj gajnitaj. (*Fakaj organizaĵoj*. En: *Esperanto*, februaro 1911, n-ro 94).

Laŭ mia humila opinio, kiun mi trudas al nenio, la Esperantistoj, kiuj klopodadas akiri tiajn malprecizajn aprobojn kaj promesojn de ne konvinkataj Parlamentanoj, simple perdas tempon, kiun ili povus multe pli utile dediĉi al pli interesaj aferoj. (...) (*Parlamentanaj promesoj kaj agoj*. En: *Esperanto*, majo 1911, n-ro 100).

(...) La utileco ne estas ĉiam proprocia al la nombro, sed al la interrilatoj. La nombro de la personoj sciantaj la latinan lingvon, estas multe pli granda ol la nombro de la Esperantistoj. Tio ne malhelpas, ke praktike la latina lingvo jam nun multe malpli utilas ol Esperanto, ne sole pro sia malfacileco (malgraŭ tio multaj personoj ĝin scias tre sufiĉe bone), sed pro manko de servoj kaj de rilatoj inter la homoj ĝin konantaj. (*Ciferoj...* En: *Esperanto*, majo 1911, n-ro 101).

Ju pli mi iras antaŭen, des pli mi estas konvinkita, ke la multnombraj paroladoj *por* Esperanto, la sennombraj gazetartikoloj pri internacilingva demando, estas nur malgrava flanko de nia utila agado. La *teoria* problemo de lingvo internacia permesas tiel multe da solvoj, ke estas pli malpli vana laboro provi unue konvinki per teoriaj argumentoj, ke tiu solvo povas esti nur Esperanto. La fakto ĉiam superas la parolon. Prediko, kiel ajn elokventa kaj brila, por Esperanto havas malpli da praktika utilo, ol vojaĝo per Esperanto aŭ peresperanta parolado pri tute alia temo. Anstataŭ prezenti al la publiko tion, kio okazos kiam la tuta mondo estos nia, kiel oni tro ofte faras, ni montru al ĝi tion, kio okazis kaj okazas.

Anstataŭ provi per unu fojo la konkeradon de tuta urbo al Esperantismo, kio estas praktike neeble eĉ en plej bonaj kondiĉoj, ni estu pli modestaj kaj kontentiĝu nin per varbado de kelkaj personoj, kiujn ni instigos al la uzado de Esperanto kaj por tiel diri vivigos en Esperantujo. La propaganda efiko rezultanta de la agado de tiuj kelkaj personoj vive profitintaj Esperanton kaj Esperantion estos centoble pli granda kaj precipe pli daŭra, ol tiu rezultanta de la plej bela gazetartikolo pri la problemo de lingvo internacia kaj ĝia solvo per Esperanto. Granda iluzio estas la kredo, ke la entreprenoj pri kiuj bruas la gazetaro, estas la plej gravaj kaj seriozaj. La plej fortaj, la plej socie utilaj organizaĵoj estas ĝuste tiuj, kiuj faras malplej bruajn reklamon kaj pri sia laboro parolas nur kiam ĝi estas efektivigita. La propagando, ni tion ne ĉesu rediri, ne estas memstara agado; ĝi estas *konsekvenco* de la uzado. Nura propagando por Esperanto kondukas al nenio daŭra, se ĝi ne estas apogata sur la uzado. (...)

(...) Tro multe da niaj samideanoj konsideras Esperantismon el loka aŭ nacia vidpunkto. Ilia horizonto ne celas trans la limoj de ilia urbo aŭ maksimume de ilia lando. Nu, konvenas ĝin ripeti, kvankam eĉ la simpla cito de tiu vero ŝajnos nenecesa: Esperanto estas antaŭ ĉio internacia afero: ĝia celo, nuna kaj estonta, estas faciligi la interpopolajn rilatojn. Multaj tion tute forgesas kaj konsideras kiel ĉefan aferon la propagandon de Esperanto en sia loko; ĝia internacia uzado venos poste... se ĝi venos. (...)

Ni unue montru al niaj varbitoj, ke Esperanto ekzistas kiel *internacia* komunikilo; poste ili sin okupos pri ĝia propagando en sia loko kun tiom pli da fervoro kaj inteligento, ke ili mem estos spertintaj, ke Esperanto ne plu estas problemo de lingvistiko, sed realaĵo vivanta. (*Du danĝeroj*. En: *Esperanto*, julio 1911, n-ro 105).

(...) Esperantismo ne bezonas politikaĉistojn, ĝi bezonas laborantojn. Al tiuj lastaj ni nin turnas. Ke al la unuaj eble ne plaĉas niaj ideoj, ni facile antaŭvidas, sed tio estas al ni plene indiferenta. (*Kiel nin organizi? III*. En: *Esperanto*, decembro 1911, n-ro 113).

(...) Se ĝi volas antaŭenpaŝi kaj ludi seriozan rolon en la movado por la plifaciligo de la internaciaj rilatoj, estas necese, ke UEA estu ne nur pure esperantista organizaĵo, rezervata ekskluzive por la Esperantista publiko. Ĝi devas pligrandigi sian agadkampon ankaŭ ekster la Esperantaj rondoj. Daŭrigante, eĉ plimultigante, plibonigante la individuajn servojn, kiujn ĝi faras al siaj membroj, ĝi flanke de tio devos entrepreni kolektivajn servojn kaj klopodojn, kiuj estus profitigaj por la ĝenerala publiko de la interesuloj pri internaciaj aferoj. Tiu ĉi tute ne scias pri nia Asocio, kiun ĝi sendiference ligas al la ideo, ke ekzistas internacia asocio, nomata UEA, kiu zorgas pri la plibonigo de la internaciaj rilatoj, kaj ĉe kiu ĝi povos trovi apogon kaj utilon. Ĝi devos scii, ke tiu asocio ne nur liveras difinitajn praktikajn servojn al siaj membroj, sed ankaŭ klopodas subteni kaj instigi ĉiun plifaciligon de la internacia vivo kaj pro tio estas aprobinda kaj helpinda. Por ke tiel estu, necese estas, ke nia Asocio pruvu sian utilecon per praktikaj laboroj, kiuj ĝenerale interesas kaj utilas la rondojn havantajn internacian agadkampon. (...) Ni ne kreis organizaĵon por ĝi mem, sed por la laboro, kiun ĝi permesas fari. (...) (*Post kvar jaroj*. En: *Esperanto*, marto 1912, n-ro 119).

(...) De la ideala kampo Esperanto transiris al la realeco. (...)

(...) Esperantismo ne plu estas io predikata kaj realigota, ĝi estas io enirinda en la vivon kaj ekzistanta per siaj propraj fortoj. Ni penetris en la pozitivan agadon. (...)

La unua principo estas, ke ĉe ni, ĉio dependas de la agado. En ĝi ni trovas la sankciojn de nia penado; el ĝi ni ĉerpas la instruojn kaj la necesajn spertojn; per ĝi ni mezuras la socian valoron de la homoj kaj kreas inter ili fortikan ligilon de solidareco. Ni neniel popagandas, ke tio estas dezirinda: tiu prediko, eĉ elokvente farita, kondukas al neniuj pozitivaj rezultatoj. Ni penas plenumi laboron pli modestan kaj pli malfacilan: ni klopodas efektiviĝi nian celon – la celon de Esperantismo mem – en maniero tre relativa, sed praktika kaj palpebla. Por plimultigi la rilatojn inter la homoj ni multigu la okazojn por reciproka alproksimiĝo, ni kreu por ili novajn servojn, materiajn sed de ĉiuj uzeblajn; ni instigu ĉe tiuj homoj novajn kaj samajn bezonojn, kiuj plifortigos la solidarecon inter ili. (...)

(...) Tra la neevitebla diferenco de la naciaj pensmanieroj ni konstatis, ke la esencaj sentoj, la veroj, la devoj, la ĉiutagaj priokupoj estas la samaj; pri tio konscias nun en ĉiu lando pli kaj pli granda nombro da

homoj, kiuj estas pretaj kunlabori kaj servi unu la alian sen atento pri la naciaj aŭ rasaj baroj. En tio utile intervenas nia organizaĵo, kiu prezentas komunan agadkampon al tiuj internaciemaj homoj de ĉiuj landoj; ili povos tiom pli facile aliĝi al ĝi, ke dank' al la principoj de Esperantismo al ili ne estos trudataj la apartaĵoj de tiu aŭ alia popolo. Interne de nia organizo ili sentos sin egalaj membroj de sama rondo, ne diversnacionoj.

Tiu praktika internaciismo, realigebla senskue en la nuna stato de la monda organizo, ne estu konfuzata kun la teoria internaciismo brue laŭdata kaj mallaŭdata, sed tre ofte malpreciza kaj piure negativa. La internaciismo de UEA estas pozitiva; ĝi ne konsistas el vortoj, sed el agado. (...)

(...) La unua metodo: prediki al la mondo kaj poste realigi, estas la metodo de la teoriistoj. Oni ĉiam estas prava, kiam oni nur bezonas aserti. Ni preferas la duan: agi unue, poste prediki... se tio estas ankoraŭ necesa. Kun nia limigita celo ni opinias, ke ni tiel utile laboras, se ne pli, por la plibonigo de la interpopolaj rilatoj, ol tiuj homoj, kiuj konstante parolas pri frateco inter la popoloj, kaj neniam faris iam seriozan klopodon por eĉ parte efektiviĝi siajn ideojn en la reala vivo. Ni cetere ne kredas, ke nia agado havas kiel konsekvencon la fratecon inter la homoj – pruvon de tio pli ofte ol necese liveras nia movado mem – ni nur celas plifaciligi iliajn rilatojn, doni al ili la okazon interŝanĝi ideojn kaj servojn. Ĉu el tio naskiĝos inter tiuj homoj sento de frateco estas tute alia demando, kies solvo dependas de aliaj kondiĉoj.

Ni alvenas al alia karakterizo de UEA: ĝi estas demokrata, unue en sia organizo, due en sia spirito. (...)

(...) Nia agado estas libera. Ni ne turnas nin al la registaroj, sed antaŭ ĉio fidus al ni mem kaj al la fruktoj de nia libera agado. Tio ne signifas, ke en diversaj okazoj nia organizaĵo ne povas serĉi apogon ĉe la ŝtataj aŭ urbaj aŭtoritatoj, kiel tio jam diversfoje okazis, sed eraro estus doni al nia agado nur tiun celon. Unu el la plej vanaj iluzioj estas la kredo, ke homaj leĝoj, eĉ kreitaj kun la plej laŭdindaj intencoj, povas ion krei kontraŭ la malfavoro aŭ malpreteco de la popoloj. Ni ne celu la kreadon de surpaperaj leĝoj, kiuj favorus nian movadon: tiuj leĝoj estas senpotencaj, se ili ne trafas publikon jam favorigitan kaj se ili ne estas konstante kaj praktike subtenataj de elprovitaj organizaĵoj.

Antaŭ ol trudi al la mondo Esperanton per la registaroj, ni laboru por trudi ĝian uzadon al la homoj, kiuj jam venis al ni. Kiam ekzistos sufiĉe potencaj internaciaj organizaĵoj, kiuj praktike uzos Esperanton, kiam ni estos vera forto, ni povos ricevi helpon de la registaroj tiom pli facile, ke ni povos vivi sen ĝi.

Agado pozitiva, agado internacia, agado popola, agado libera, jen estas la formulo, kiu gvidas nian laboron kaj, laŭ kiu ni dezirus, ke niaj amikoj direktu sian agadon. Granda tasko staras antaŭ niaj okuloj. Por ĝin plenumi ni bezonas homojn, kiuj timas nek laboron, nek agadon. Multaj ili jam estas en nia Esperantujo, kaj se en la daŭro de la kvar pasintaj jaroj ni povis plenumi parton de nia tasko, se malgraŭ ĉiuspecaj malhelpaĵoj ni sukcesis vivi kaj progresi, tion ni ŝuldas antaŭ ĉio al niaj sindonemaj amikoj, Delegitoj, konsuloj aŭ simplaj membroj (...). (*La agado de UEA. Parolado de Hector Hodler, direktoro de UEA, okaze de la tria kongreso en Krakovo. En: Esperanto, septembro 1912, n-ro 130.*)

(...) La intergenta paco, kiu estas tiel necesa por nia progresado, estis longe rompita sur parto de Eŭropo, kie nia afero iam prospere disvolviĝis, kaj ofte niaj koroj tremis je la penso, ke la fantomo de pli ampleksa milito povus enkorpiĝi kaj por longa tempo nuligi multjaran nian paciencajn laboradon. Tiu terura

timindaĵo feliĉe ne okazis, sed la ondo de ŝovinismo, kiu trapasis Eŭropon, la atmosfero de malpaco kaj sango, en kiu ni vivadis, nedubeble malhelpis la antaŭeniron de nia afero. Nuntempe, sub la influoj de aluditaj okazintaĵoj, ni devas konstati malprogreson de la internaciemaj ideoj, je kies irado – kian ajn opinion oni havas pri Esperantismo – estas intime ligata nia movado. Kiam aŭdiĝas la bruo de la armiloj, kiam ĉiu estas konvinkita, ke la sovaĝa batalo de la homo kontraŭ la homo devas anstataŭi la batalon de la homo kontraŭ la naturo kaj la mallumo, tiam ni ne esperu, ke multe progresos nia afero, kiu bazas sur intima trankvila kunlaborado de la homoj el ĉiuj gentoj kaj el ĉiuj gentoj kaj el ĉiuj nacioj. Teorie, oni ĉiam povas aserti, ke Esperanto, estante nur lingvo, povas servi egale por la paco kiel por la milito; praktike, neniu senpartia homo povas nei la parencecon de la internaciemaj movadoj kun nia. (*Parolado de Hector Hodler okaze de la malferma kunsido de UEA*. En: *Esperanto*, 24 aŭgusto 1913, n-ro 16; *Oficiala Kongresa Gazeto*, 27a de aŭgusto 1913, n-ro 4).

Por taŭge juĝi nian aferon, ni ne devas nin izoligi for de la cetera mondo. Ni ja devas ankaŭ atenti pri la eksteraj kondiĉoj, kiuj povus favori aŭ malhelpi ĝian disvolviĝon; ni devas ĝin kompari kun aliaj movadoj. Ni unue substreku tiun malnovan veraĵon, ke ĉiu *nova* ideo tre-tre malfacile enradikiĝas en la mondo. Ne sen kaŭzo ni insistas pri la vorto *nova*. Multaj ideoj aŭ celadoj, kiujn ni opinias novaj, estas en la realeco nenio alia ol malnovaj ideoj vestataj per aliaj vortoj. La mondo sin multe agitadas, sed la fortoj, kiuj movas tiun agitadon, estas tiel malnovaj kiel la mondo mem; nur alian nomon ili havas. Sed ĝuste Esperanto ne estas io jam vidita; ĝi estas nova ideo, nova valoro, kiu pliriĉigos la mondkulturon. Tial ĝi nur malfacile povas krei al si lokon en mondo multe pli okupata je la interbatalado de malnovaj ideoj ol je la kreado de novaj sociaj valoroj. Esperanto postulas de ĉiu homo, kiu venas al ĝi, ian laboron, ian personan penadon: nova malfacilaĵo. La homoj ja volonte aliĝas al iu nova opinio aŭ nova kredo, sed ili ne deziras, ke tio trudu al ili laboron.

Sed Esperanto ne restis sole ideo; ĝi fariĝis organizita movado, kaj interne de tiu movado estas homoj malsamaj laŭ rasoj, laŭ klasoj, laŭ opinioj – plej granda heterogeneco, kiu certe enhavas la ĝermon de multaj disputoj, malkonsentoj, malfacilaĵoj, rezultantaj el la diversaj mentalecoj. Nin ĉiujn unuigas nur la lingvo, la deziro ĝin uzi kaj ankaŭ pli-malpli precizaj ideoj pri paco. Ni do devas ligi nin al tiu necesega minimumo; pri ĉia alia ideo ni estu neŭtralaj aŭ, preferinde, toleremaj. Ju pli ni nombre plimultiĝos, des pli kreskos la malfacilaĵoj rezultantaj el la diverseco de nia anaro. Tial al la direktantoj de nia movado granda idelargêco kaj toleremo estas necesaj.

Plie la fatalo volis, ke al ĉiu nova movado, kia ajn estas ĝia celo, aliĝas, flanke de elementoj progresemaĵoj kaj idealistaj, homoj kun utopia mentaleco, stranguloj, maniuloj, kaj aliflanke malkontentuloj, ambiciuloj aŭ simple amatoroj; ĉiuj malhelpas pozitivan agadon, ĉu ĉar ili ellaboras tute nerealigeblajn projektojn, ĉu ĉar ili uzas la movadon, al kiu ili aliĝas, por pure personaj celoj. Tion konis nia movado – kiel ĉiuj movadoj; nur iom post iom ĝi povas sin liberigi je tiuj skorioj. (...)

(...) Ni gardu nin formi en nia movado sektemajn partiojn kun mallarĝa kredo. Utiligi malsamajn verojn, laŭ la bezonoj de la momento, ĝuste estas la merito de la bonaj gvidantoj. En la lastaj jaroj utile estis speciale insisti pri la neceseco de bona organizo. Nian organizon ni plibonigis; fariĝis nun denove utile atentigi pri la bezono de energia individua agado. Tion farante ne ne ŝanĝas opinion; ni nur penas restarigi taŭgan ekvilibron. Relativeco de principoj trudas al ni toleremon. (*Pripensoj*. En: *Esperanto*, 20 decembro 1913, n-ro 159).

## **Antologio VIII**

### **Auguste Forel**

Kuracisto, psikiatro, formikologo, humanisto

### **Kulturceladoj de la nuntempo (1910)**

#### *Enkonduko:*

Auguste Forel (1848-1931) estis konata sciencisto kaj socia aganto, pioniro en medicino kaj psikiatrio. Multaj memoras lin kiel kolektanton de formikoj kaj kiel formikologon, kiel filozofon-moraliston, avangardan humaniston kaj kiel pacaktivulon. 1879-97 li laboris kiel direktoro de la psikiatra kliniko Burghölzli en Zuriko.

Lige kun siaj humanismaj kaj pacistaj engaĝiĝoj kaj la klopodoj por akceli la popolan kleriĝon, Forel rilatis kun intereso kaj eĉ kun entuziasmo al la ideo de neŭtrala universala lingvo. Kredante je la neceso de la unuiĝo de la popoloj de la mondo kaj ankaŭ je la raciigo de la lingvolernado, Forel, kiu ĉeestis la 2an Universalan Kongreson de Esperanto en Ĝenevo, lernetis Eon kaj uzis plurajn okazojn esprimiĝi pri senco kaj esenco de la mondhelplingva ideo.

Kadre de prelego ĉe la *Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo (IOEK)*, societo iniciatita de Forel mem kun la celo puŝi la etikan socialan progreson, spiritan liberecon kaj civilizecon sen influo de partipolitika influo, la 27an de februaro 1910 en Berno (Svislando), li kaptis la okazon prezenti la esencon de sia filozofio maturiĝinta ĝis tiu epoko. En tiu prelego li tuŝis ankaŭ la demandon de la neŭtrala universala lingvo.

Forel perfekte perceptis la argumentadon de L.L. Zamenhof favore al la neŭtrala universala lingvo, kaj en maniero konvinka, racia-logika kaj pasia, sed nefanatika Forel publike varbis por tiu nobla ideo. Kritikinte aliajn konatajn planlingvajjn sistemojn, Forel proklamis Eon kiel praktike jam pruviĝintan helplingvon. Li laŭdis ĝin, ĉar laŭ li ĝi estas treege facile lernebla, parolebla kaj skribebla, kaj bedaŭris, ke al ĝi mankas la oficiala (eĉ deviga) enkonduko ekzemple en la lernejojn far la registarojn.

Ĉi-sekve estas represita la koncerna ĉapitro pri la neŭtrala universala lingvo el tiu berna prelego, kiun esperantigis la svisa e-isto Friedrich Uhlmann kaj eldonis ĝin en 1911 en broŝura formo sub la titolo *Kulturceladoj de la nuntempo*.

(En →Antologio XIV, jaro 1924, sekvos la citaĵoj el la ĉefverko de Auguste Forel, *Der Weg zur Kultur / La Vojo al la kulturo*).

*Originala teksto (Esperanto-traduko de F. Uhlmann):*

## 9. La Mondlingvo

La ĉiopova antaŭjuĝo kutimas apriorie malfavore juĝi la mondlingvon kaj tamen mi petas konsideri la jenajn fiksjajn faktojn.

1<sup>e</sup> Kun la progresado de l' kulturo niaj cerboj ĉiam plie estas superŝarĝataj per la konstante amasiĝantaj konoj kaj postulegas deŝarĝon de neutila butikaĵo.

2<sup>e</sup> Ĉiam plimultenombraj antaŭaj popolaj idiomoj kaj dialektoj fariĝas kulturlingvoj, ekzemple la rusa, hungara, ĉeĥa, rutena, armea, novgreka, turka, bulgara, flandra, slovena, ĥina lingvoj ktp. – kaj nun:

3<sup>e</sup> Kiu povos aneksi samtempe ĉiujn tiujn ĉi lingvojn kaj la kreskantan scion? Kaj tamen ĉiu el tiuj ĉi lingvoj volas propriĝi ĉiun scion kaj krei propran literaturon. La angla lingvo ja estas la plej disvastigita sed unue ĝi estas tre nebonsona, eĉ la malo de fonetika. Kaj antaŭ ĉio la aliaj kulturlandoj nepre neniam lasos sin absorbi de la angla spirito kaj de la angla lingvo.

4<sup>e</sup> Kiel neŭtrala, tre facila, fonetika kaj bonsona mondlingvo jam praktike pruviĝis Esperanto. Ĝi estas treege facile lernebla, parolebla kaj skribebla. Sufiĉus ĝin instrui en la lernejoj, por ricevi sur la tuta tero simplan reciprokan interkomprenigan lingvon. Esperanto estas tre flue parolebla; mi mem konvinkiĝis pri tio dum la internacia Esperanto-kongreso en Ĝenevo. Per ĝia helpo sin reciproke tre facile komprenas la homoj de ĉiuj lingvaj distriktoj, ĝia literaturo jam estas tre ampleksa! Tiu ĉi lingvo facile nin elirigus el la hodiaŭa Babel'a turo. *Ne estas vere*, ke la uzado de Esperanto ne estas praktike efektivegebla! Tiu ĉi lingvo jam multe estas uzata kaj nur ankoraŭ mankas la oficiala enkonduko. Mi ekzemple priskribis novan specon de formikoj en Esperanto ne trovante malfacilaĵojn ĉe la formado de l' diversaj esprimoj.

5<sup>e</sup> La scienco estas internacia. Sed fariĝas ĉiam pli malfacile, parte neeble, perfekte koni la lingvon en kiu, flanke de la gepatra lingvo de l' aŭtoro, ĉio aperas, kaj per kiu oni, kiel en Esperanto-kongreso, facile povas interkompreniĝi en ĉiuj internaciaj kongresoj kaj oni konsideru kia plisimpligo de nia vivo kaj de nia laboro tio estus kaj kiom pli da spiritaj fortoj estus je nia dispono, kiujn ni hodiaŭ malŝparas por la ellernado de malfacilaj formoj de diversaj fremdaj lingvoj! Kiel multe plifaciliĝus la vojaĝado!

6<sup>e</sup> Estas fakto, ke la malamikeco inter la kulturaj popoloj per nenio, krom la religiaj kontrastoj, tiel multe estas daŭrigataj kiel per la lingvaj kontrastoj. Kion oni nomas nacia malamo, grandparte nur estas lingvokontrasto!

Jam pro tiuj ĉi kaŭzoj ĉiu progresema homo ĉie forte devas helpi la enkondukon de l' mondlingvo. Kvin ĝis dek horoj sufiĉas por kleruloj al la lernado de Esperanto; certe poste alvenos ankoraŭ ekzercado, por ĝin flue paroli kaj skribi. Oni povas ĝin legi tuj post la lernado. Nur la antaŭjuĝo kaj la inerteca leĝo kontraŭstaras la grandegan kulturprogreson de enkonduko de mondlingvo kiel internacian helpan kaj interkomprenigan lingvon. Bone komprenu, ne kiel anstataŭanton por la gepatra lingvo.

## **Antologio IX**

### **Wilhelm Ostwald**

Nobelpreisträger für Chemie

### **Die Organisation der Welt (1910)**

Vortrag in Basel

#### *Enkonduko:*

La germana kemiisto kaj nobelpremiito (1909) prof. d-ro Wilhelm Ostwald (1853-1932) naskiĝis en Riga (tiam Ruslando), studis en Dorpat kaj laboris inter 1887 kaj 1906 kiel profesoro en Leipzig (Germanio). Sian internacian reputacion kiel kemiisto kaj filozofo li dankas al malkovroj sur la kampoj de substancoj (energio kaj materio), de organikaj acidoj kaj kolorscienco.

Lige kun lia intereso pri la problemoj de la utiligo de la energio okupis lin la problemoj de la organizado de la mondo, en kiu necesas solvi ankaŭ la demandon de la neŭtrala universala lingvo.

Post la starigo de Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire (1901) Ostwald apartenis, kun aliaj sciencistoj kiel Baudouin de Courtenay, Jespersen, Schuchardt, Peano, Couturat k.a. al la komitato, kiu devus elekti la taŭgan neŭtralan universalan lingvon. En 1907 ĉi tiu komitato diskutis diversajn planlingvajn projektojn kaj submetis al la Lingva Komitato (de Esperanto) katalogon de reformoj, kiuj estis rifuzitaj de ĝi. Post tio la komitato komencis propagandi sian reformprojekton kiel alternativon al Eo, kaj en 1907 ĝi estis oficiale publikigita sub la pseŭdonimo 'Ido'.

La 7an de septembro 1910 Ostwald prelegis en Basel (Svislando) pri la temo 'La organizado de la mondo'. En tiu prelego li enkonduke traktis la problemon de la homa energio, kiu estas elspezata en multaj okazoj kiel dum manĝado, ĉe elektra lumo, en monŝanĝado, ĉe vapormaŝino, bicikloj, aviadiloj ktp. Laŭ Ostwald la homaro ne povus eviti la konkretan organizadon de la rapidaj progresoj de la tekniko kaj de la internaciigo de la scienco kaj kulturo. Lige kun la granda energi-uzado, kiu estas necesa ankaŭ por lerni fremdajn lingvojn, necesus konsideri la demandon de la neŭtrala universala lingvo. Ĉar naciaj lingvoj ne estas perfektaj, sekve necesus konstrui novan lingvon, kiu estus pli perfekta, analoge al la starigo de komune akceptitaj sistemoj de la mezuroj (Gauss) kaj de la elektro (Weber). En tia neŭtrala universala lingvo Ostwald vidis la novan trafikilon, kiu ne havus la taskon ŝarĝi la homon, sed disponigi al la homo komfortan kaj ekzaktan rimedon por la komunikado.

Ostwald sugestis la kreon de internacia instanco ('Sprachamt'), kiu organizus sisteme la progreson de la adopto de neŭtrala universala lingvo. Estus bone trovi ŝtaton, kiu transprenus la iniciativon sur tiu kampo. Tia ŝtato povus esti Svislando, kiu sukcesus laŭ Ostwald pli facile kunordigi tian projekton ol granda ŝtato kun peza organismo. Pro siaj politikaj rilatoj kun la najbaraj landoj kaj pro sia etna konsisto Svislando estus antaŭdestinita.

Kadre de sia membreco en la supre menciita komitato Ostwald staris pli proksime al Ido ol al Eo. Tial la idistoj utiligis kaj disvastigis la kontribuojn de Ostwald sub la idista stelo. La prelego de Ostwald, kiu estas represita ĉi-sekve, estis eldonita en 1910 en Basel (Verlag des Weltsprache-Vereins 'Ido'). H. Peus adaptis ĝin (evidente en iom resuma formo) al Ido kaj eldonigis ĝin en Dessau, decembro 1910.

Originala teksto (en la lingvo germana kun traduko en Ido):

